

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Estraro: Gravas
la servo-kvalito**

**Enderby:
Milito kaj devoj
esperantismaj**

**Intervjuo el
Albanio: Vasil
Pistoli 75-jara**



Gbeglo: La unua kunsido

Vi trovos...

81 Malferme

Rigardi en spegulon de ŝanĝoj

Nikola Rašić

82 **Ne Afriko, la afrikanoj bezonas Esperanton**

*Intervjuo kun
Gbeglo Koffi*

*"Kiuj vere ellernas
Esperanton, tiuj
malkovras la realon
kaj ne elreviĝas"*



84 Milito

Iam ĉesos bleki la kanonoj

Kep Enderby

Ĉiam valida alvoko

Henri Masson

85 Estraro

Tra la kontinentoj de Esperantujo

István Ertl

86 **ESPERANTO EN RADIO**

87 Eŭropo

"Sen instruado velkos nia movado"

Intervjuo kun Vasil Pistoli

88 **NAVIGE TRA TTT-PAĜOJ**

88 **MALFERMA TAGO, DEKAN FOJON**

90 **REAGOJ**



91 Forumo

Ĉu ni preterdormos informeksplosion?

Miroslav Malovec

92 **RECENZOJ**

*Kalle Kniivilä pri
Esperanto sen mitoj*

*Seán Ó Riain pri
Kio ni estas kaj kion ni celas*

*Humphrey Tonkin pri
Language Minorities and Minority
Languages in the Changing Europe*

*Franz-Georg Rössler pri
tri muzikkasedoj*

*MAO Zifu pri
tri elsvedigoj de Sten Johansson*

*Sten Johansson pri
La vidvino kaj la profesoro*



95 **LASTE APERIS**

Kaj plue...

96 **Fake**

97 **Loke, Foliume**

98 **Influe, Persone Oficiala informilo**

99 **Anoncetoj**

100 **Forpasoj**

La kovrilo: Portreto de GBEGLO Koffi. (Franĵo Veuthey)

Dekstra paĝo: Taŭrobatalo en suda Francio. (Jeannine Bony)

ESPERANTO

*Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)*

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establitita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.
Grafiko: Francisco L. Veuthey.
Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.
Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.
Legata en 115 landoj.
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66; USD 36; DEM 58; JPY 4300 ktp); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas 5,50 gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2100, 1/2 p. 1150, 1/4 p. 630, 1/8 p. 350, 1/16 p. 190.
Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).
Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: +31-10-436-1044.
Telefakso: +31-10-436-1751.
Retpoŝto: uea@inter.nl.net.
Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.
Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.
Direktoro de la Centra Oficejo: Pasquale Zappelli.



RIGARDI EN SPEGULON DE ŜANĜOJ

Pasas jam aprilo, en Nederlando floras tulipoj, kaj en Roterdamo pluvas, pluvas... kongresaj mendiloj; la kongresprepara maŝino turniĝas ĉiam pli kapturne. Sieĝas telefonvokoj el Berlino, Tel-Avivo, Zagrebo...

Pasintjare pro okupiteco mi ne festis mian dekjariĝon kiel konstanta kongresa sekretario. Dum tiu jardeko mi spertis kiel daŭre ŝanĝiĝis la UK-oj: fakte, spegule al la drastaj ŝanĝoj de la mondo ĉirkaŭ ni. En Braĵtono ankoraŭ fajris lastaj sparkoj de la movada "malvarma milito" inter du klare polusaj frakcioj en la Komitato. Sed la postan jaron en Kubo ni jam trovis nin inter la du mondoj: en unu flanko falis la Berlina Murego, en la alia sonis "Socialismo aŭ morto". Bergeno vidis la unuajn signojn de la postmura epoko: nekutima amaso da rumanoj, GDR-anoj (kion signifas tiu siglo?)... litovoj kaj rusoj sur neforgesebla "spiona" soveta ŝipo, kiu neniam sukcesis eniri norvegajn akvojn! En Vieno la ondo iĝis tajdo, tiom abundis orientlandaj samideanoj. Ni antaŭsentis degelon de niaj frustroj, realiĝon de la revoj pri integriĝo de la du movado-partoj. Sed jam dum Bergeno oni elpafis la unuajn kartoĉojn ĉe Vukovaro, en mia denaska Slavonio. En Vieno jam intermilitis eksaj jugoslavoj, la Komitato dispecigis iam aktivegan landan sektion. Stariĝis Konto Espero: mi preferus neniam vidi bezonon pri ĝi. Tonkin deklaris ke falis ne nur la ideologiaj sistemoj, sed ankaŭ la idealoj...

Jen, la komenco de la Postmoderno. Skeptika kaj sendube iom cinika epoko. En la unua Postmoderna kongreso, la Valencia, jam mankis multaj samideanoj. Mankis ankaŭ mono. Leviĝis novaj muroj inter la popoloj dividitaj: kotizaj, vizaj, vojaĝkostaj. Ĉu de nove malaperos niaj retrovitaj samlingvanoj, mal-kreskos landaj asocioj, malproksimiĝos la samideanoj, paliĝos la revo? Nun pli kaj pli malfacilas trovi volontulojn, senpagajn kongresajn helpantojn. Krom inter tute malpostmodernaj pensiuloj: jen la spino de la Movado, la portantoj de klasikaj valoroj. Siaflanke la junularo faras brilajn aferojn, sed demandas pri honorarioj. Ja prave: tiel funkcias la nova mondo, necesas serĉi sponsorojn, pensi komerce, malrevi plane kaj sobre. Imponas la fakturoj de la kongresejoj; ankaŭ la spezo-kontoj de UK-oj, sed per sia malkresko. Ni havas jam retejojn, rivelas diĝitajn fotojn en la Gazetara Servo... kolizias la du mondoj de klasika movadeco intermilita kaj de nova epoko kun siaj drastaj ŝanĝoj ĉiujaraj. Kiom ni sukcesos sekvi la fluon? Mi ne scias, sed ankaŭ ne tro zorgas, allasas min al la natura evoluo. Mi ankaŭ sentas ke la movado reagas kaj tenas la paŝon. Tamen kelkloke necesas puŝi kaj anticipi la evoluojn, flari la venton de la epoko. Estas ekscite vivi en tiu ĉi tempo, ekscite transformi sin... ekscite kaj vivnecese.

Nikola Raŝić



Gbeglo Koffi: "Ĉiu esperantisto afrika"

Ne Afriko, la afrikanoj bezonas Esperanton

Agrablan okazon donis al nia revuo la kunsido de la UEA-estraro por intervjui ĝian unuan afrikan anon, GBEGLO Koffi el Togolando.



■ *El via verko De vilaĝo al ĉefurbo, kiu temas pri viaj infanaj jaroj, ni scias ke viaj gepatroj komence ne opiniis utila ke vi frekventu lernejon.*

Jes, en mia vilaĝo Anyron-Kope — kiu havis tiutempe inter 200 kaj 300 loĝantojn, nun 400-500 — oni tiam ne konsideris lernejon utila. Sed la tempo ĝanĝiĝis.

■ *Ĉu vi estas la plej alte edukita vilaĝano?*

Tute ne, pluraj havas nun almenaŭ same altan edukigon kiel mi, kiu estas instruisto pri matematiko. Nuntempe la respekto al lernejo estas kreskinta, sed malsamgrade en la diversaj regionoj de Togolando. La ŝtato klopodas malgrandigi tiujn regionajn diferencojn.

■ *Ĉu la lernej-finintoj emas resti en Togolando?*

Nu, ankaŭ ĉe ni okazas cerbo-fuĝo, elmigro de kapabluloj, sed ne tiom al la unua mondo kiom al la proksimaj Eburbordo, Niĝerio, Gabono, Senegalio ktp. Nun la politika situacio en Afriko devigas homojn migri trans la oceanon.

■ *Vi havas relative bonan profesion hejmlande.*

Nu, iusence eĉ pro tio mi povas danki al Esperanto, kiu donis al mi perspektivojn en la vivo. Ekzemple, kiel lerneĵano mi estis timema, sed Esperanto multmemigis min, ne plu mi hezitas paroli publike. En mia profesio helpas miaj scioj pri Cseh-metodo: instruante matematikon


aŭ biologion, mi montras la preparolataĵon, referencas al jamaj spertoj, aplikas ludojn ks. Rilate religion, per E-o mi povis informiĝi pri multaj diversaj kredoj, malkovri la mensogojn de paganismo kaj la rigidecon de katolikismo.

■ *Kaj esperantistoj helpis vin plej persone: vian rakonton Kaj kio poste? vi dediĉis al tiuj per kies helpo realiĝis grava operacio de via filo Dzifa.*

Dzifa naskiĝis kun kordifekto kaj bezonis rapidan operacion. Dank' al helpo de Hans Bakker, Jean-Paul Beau, Claude Piron kaj aliaj, kun interveno de la homhelpa organizaĵo Terre des Hommes ["Tero de la Homoj"], la komplika operacio povis esti sukcese farita en Ĝenevo.

■ *Ni vidis Dzifan, kun la fratineti Aminda, sur foto en nia revuo (jan., p. 11).*

Jes, nun li jam estas granda kaj fartas bone. Mi diru ke mi ricevis multan helpon el Eŭropo ankaŭ en 1993, dum krizo en Togolando. Daŭra amikeco interligas min kun Hemmo Tietti en Finnlando, ĉe kiu mi pasigis gaste du monatojn en 1989. Mi ne povas konsideri Hemmon nur amiko; lin mi nomas "patro", kaj li min "filo". Hemmo kaj Panjo Veera (mortinta en 1990) estas miaj adoptaj gepatroj en la E-mondo. Multajn dankojn mi ŝuldas al ili, kaj precipe al Hemmo. Mi honoras lin miamaniere per TIETTI-Instituto de Esperanto en Togolando.



GBEGLO Koffi
montras sian daŭre
kreskantan verkaron
en la ĝardeno de la
Centra Oficejo.

■ Kial ĝuste Togolando plej floras movade en Afriko?

Unue, dank' al tre agemaj unuopuloj, kiel Mensah Agbemadon, Yao Afantchao, Raoul Hounnake kaj Kokou Sagbadjelou. Due, ĉar multajn junulojn allogas ambiciaj ideoj pri tio kion ili povus atingi per Esperanto por sia estonteco. Tio ekzemple naskas konfliktojn ĉe la divido de E-materialoj kiujn ni ricevas. Sed en Togolando ĉiuj movadaj agoj nun estas bone organizataj kaj publike anoncataj, kontroleblaj.

■ Kio okazas kun tiuj junuloj kiam la realo forbalaas iliajn iluziojn?

Nu, ili komence volas ekz. profiti vojaĝojn por sondi siajn eblojn eksterlande kaj eventuale ne reveni al sia lando. Mi ĉiam emfazas ke ĉiu rajtas uzi la lingvon Esperanto por ĉio ajn, sed por uzi oni ja devas *ellerni* ĝin! Kiuj ĝin vere ellernas, tiuj mem malkovras la realon, kaj tiel ne elreviĝas; ili tamen trovas alian aperturon por sia vivo.

■ Ekster via lando, Afriko malpli viglas movade, kvankam tiu kontinento devus esti facila tereno por Esperanto, kun siaj loĝantoj plej ofte plurlingvaj.

Prave, sed en Afriko la lingva problemo prezentiĝas alie ol en Eŭropo. Ĉi tie, tuj ĉe transiro de landlimo, la lingvo ŝanĝiĝas. En Afriko la lingvoj de koloniintoj — la franca, angla — ankoraŭ plenumas translime sian rolon peradan.

■ Ni relevu provokan demandon: ĉu Afriko bezonas Esperanton?

Ne Afriko, sed la afrikanoj bezonas Esperanton; nek pli nek malpli ol aliaj mondanoj. Iuj, ekzemple Bernard Golden, skribis ke Afriko *ne nun* bezonas Esperanton, ĉar ĝi havas pli urĝajn problemojn — sed tion ni povus diri pri la tuta mondo. Cetere, jen plia ekzemplo pri la utileco de Esperanto por individuo: por trapasi ekzamenon, estis nepre bezonataj por mi materialoj, kiujn mi ricevis per esperantistaj kontaktoj. Ankaŭ Eŭropon mi neniam vizitus sen Esperanto. Amiko iam diris al mi: ne perdu tempon per Esperanto! Sed la sama amiko iom enviis min okaze de mia unua vojaĝo al Eŭropo, al la Jubilea UK Varsovia, en 1987. Ĉiu unuopa esperantisto afrika povas diri kion Esperanto alportas al li. Ankaŭ eksterafrikanoj povus diri ĉu esperantistiĝo de afrikanoj alportas ion al ili. Nur tiel ni povas juĝi ĉu Afriko bezonas Esperanton aŭ ne.

■ La trian fojon vi venis al Eŭropo jam kiel estrarano de UEA. Kion vi spertis?

Antaŭe mi ne bone konsciis pri la gvidstrukturo de UEA, pri tio kiom multe la estraranoj devas konsideri la spertojn de la oficistoj por fari bonajn, realigeblajn decidojn. La demokratio en UEA ja funkcias simile kiel en ŝtatoj: la decidoj de la ministroj — anoj de demokratie elektita registaro — baziĝas sur la laboro de la administraciaj spertuloj. Ĉi tiuj ne rajtas decidi mem. Ili proponas, konsilas; nur la ministroj decidas. La ministroj bezonas proponojn kaj konsilojn de la administracioj, kiuj neniam rajtas ion trudi al siaj ĉefoj. Efike laborantaj ministroj scias interkonsiliĝi ĉiam kun la spertuloj antaŭ decido. Tia laboro estas ĉiam fruktodona. Mi ŝatus ke la aferoj iru tiel inter la oficistoj de la CO kaj la estraranoj de UEA. Ofte oficistoj decidas mem, preter la estraro. Tion ni evitu kaj klopodu akordiĝi ĉe la faro de gravaj decidoj.

■ Rilate vian estraranan fakon, la oficistoj ne havas rektajn spertojn pri Afriko.

Konsentite. Kaj estas ja progreso ke ne plu eŭropa estrarano okupiĝas pri Afriko, kiel ĉiam antaŭe. Aliflanke, ni atentu ke ne fariĝu iel natura la ideo: estrarano el Afriko zorgu pri Afriko kaj nur pri Afriko. Tamen, mi konscias pri miaj limoj en la estrara taskodivido: kiel instruisto pri matematiko, mi ja ne korektas taskojn pri la franca lingvo.

■ Laŭ la kolofono de nia revuo, vi estas la sola estrarano sen reta atingebleco.

Mi miamaniere ret-ligiĝas kun aliaj estraranoj kaj kunlaborantoj. Mi uzas komercan servon, kio kostas iom multe da mono kaj tempo. La ret-ejo troviĝas je kvardek-minuta vojado per motorcikla for de mia domo. Tial mi iras tien unufoje en semajno. Mi ŝatus eviti tro da elspezoj, kaj tial mi ne publikigis la adreson. Tamen, mi serĉas la plej taŭgan rimedon retan, kiun mi iam igos publika.

■ Ĉu vi daŭre verkas?

Mi daŭre verkas, sed ne plu librojn. Mi tamen ŝatus verki lernolibrojn, kio estas nun iom malfacila, ĉar inter miaj bruemaj infanoj manketas la necesa soleco. ★

Iam ĉesos bleki la kanonoj

Kep Enderby

Kelkajn tagojn post la ĵusa eksplodo de milito en Eŭropo, SAT-aktivulo Henri Masson lanĉis alvokon, la 27-an de marto. Prezidanto Enderby donas aktualan interpreton de la Hodleraj frazoj cititaj de Masson.

Milito ĉiam estas horora — des pli por ĉiuj kiuj fleugas idealismajn esperojn humanajn por nia homaro tutmonda.

Pri la terura milito kaj perforto okazanta en Balkano, Indonezio, kaj (eble malpli rimarkate) en multaj aliaj mondopartoj, mi skribas kiel prezidanto de asocio kiu fundamente celas atingi pacan mondon, regatan de interpopolaj frateco kaj justeco — ecoj ne oftaj en nia hodiaŭa mondo.

En la nuna tempo de furioza mortigado, la vortoj de Hector Hodler, unua prezidanto de UEA, memorigu nin pri la respondecokaj kiujn devigas niaj esperantistaj esperoj.

“Ni havas la devon *ne forgesi*. . . Flanke de niaj simpatioj, ni havas devojn, kiujn al ni trudas nia esperantisteco” — skribis Hodler. Kiel

interpreti tion, kaj kiel ekagi laŭ la interpreto?

Kvankam ĉiu opinias laŭ propra kapo pri la kaŭzoj de la milita detruado kaj mortigado — aparte se temas pri Balkano —, nin, esperantistojn, precipe okulfrapas la ofta foresto de vero en la informoj transdonataj al ni,

kaj la malgraviĝo de Unuiĝintaj Nacioj — specife de ties Sekureca Konsilio —, la internacia instanco kreita ĝuste por preventi tiajn terurajn situaciojn militajn.

Ĉu estas troigo diri ke ni ekvidas kun bedaŭro ian ripetigon de tio kio okazis al Ligo de Nacioj en la 30-aj jaroj, kiam tiu organizo estis flankenigata de registaroj, ĉiu strebanta sekvisian propran potenc-politikon?

Kiel ajn: politika malstabileco restos longdaŭra en la batalantaj mondopartoj, kaj ĝin longtempe akompanos amara memoro pri maljustaĵoj kaj kruelaĵoj. Jen kondiĉoj kiuj, ligitaj kun la rezultaj malamo kaj venĝemo ĉe multaj, produktos terorismanton tian ke ĝi minace daŭros tra multaj generacioj.

La Hodlera devo kiun al ni trudas nia esperantisteco, estas duobla: ni klopodu kompreni — ĝuste kaj juste — la okazintaĵojn, por malhelpi ilian daŭrigon aŭ ripeton, kaj ni helpu ripari, laŭ nia plej bona kapablo, la terurajn damaĝojn okazintajn en la militejoj.

Dume, kiel individuoj, ni pledu kaj aktiviĝu ĉe tiuj kiuj havas la potencon, en ĉiuj niaj landoj, dirante al ili: ĉesigu la detruon, perforton kaj mortigadon, ene kaj ekstere de viaj landlimoj — donu ŝancon al la paco! ★



ARKIVO DE UEA

Ĉiam valida alvoko

Henri Masson

Komence de la unua mondmilito, Hector Hodler lanĉis alvokon, kiu plue validas en la nunaj cirkonstancoj. Ĝi meritas tradukon en ĉiujn lingvojn kaj laŭeble plej vastan diskonigon en amasinformiloj kaj en lernejoj. Ĝi aperis sub la titolo “Super” en Esperanto de 5 januaro 1915, en la Internacia Lingvo, kiun li lernis kiel 16-jara liceano kaj pri kiu li estis unu el la pioniroj en Svisio:

Ni havas la devon *ne forgesi*. . . Flanke de niaj simpatioj, ni havas devojn, kiujn al ni trudas nia esperantisteco. . . Devo kredi, ke neniuj popolo havas la monopolon de la civilizeco, de la kulturo aŭ de la humaneco. . . Devo kredi, ke neniuj popolo entute havas la monopolon de la barbareco, perfideco aŭ stulteco. . . Devo konservi prudenton eĉ meze de la premigaj influoj de la popol-

amasoj. . . La parolo estas nun al la kanono, sed ne eterne daŭros ĝia blekado. Kiam centmiloj da homoj kuŝos en la bataltomboj kaj la ruinoj ĉe la venkintoj kaj venkitoj atestos pri la teknikaj pli ol pri la moralaj progresoj de nia civilizeco, tiam oni alvenos al iu solvo, kaj tiam, malgraŭ ĉio, la internaciaj rilatoj denove ligiĝos, ĉar super la nacioj estas tamen io. . . Se sur la nunaj ruinoj ni volas konstrui novan domon, oni bezonos tiajn laboristojn, kiujn ne timigos la malfacilaĵoj de la rekonstruado. . . Ni, Esperantistoj, estu la embrio de tiuj estontaj elitoj. Por inde plenumi nian taskon, ni konservu nian idealon kaj ne lasu nin subpremi de la malespero aŭ de bedaŭro.

Estas notinde ke dum la Unua Mondmilito, iniciate de Hector Hodler, Universala Esperanto-Asocio plenumis 200 000 servojn en interrilatado de militviktimoj per transsendo de leteroj, kaj foje ilia tradukado, sen kalkuli aliajn interhelpajn agadojn.

Tra la kontinentoj de Esperantujo

István Ertl

Post multaj retroŝtaj interŝanĝoj, unuan fojon kunsidis la nova Estraro, de la 27-a ĝis la 29-a de marto, en la Centra Oficejo.

El la estrara trarigardo de ĉiuj kontinentoj de Esperantujo elstaris du mondregionoj:

Afriko devus vidi realiĝon de “afrika oficejo” — ideo de longe alstrebeta.

Tamen, ĝi prefere situu ne en Afriko mem, pro la infrastrukturaj k.a. problemoj tie, sed, pli praktike, en Eŭropo, lige al la CO. Oni daŭre venigus spertajn afrikanojn: baldaŭ revenos Nederlanden Raoul K. Hounnake, jam laborinta volontule en Roterdamo (vd. marto '98, p. 42).

Por arabaj landoj ĝis nun ekzistis komisiito (Hugh Martin, Britio); nun ek estos tuta komisiono (krom Martin: Trude Sinno, Nederlando; Raymond Lecat kaj Guy Penet, Egiptio).

Ke ĉi tiuj landoj meritas atenton, tion aŭguras pli ol 80 informpetoj, kiujn la CO ricevis reage al anonco aperinta decembre en du gazetoj de Jordanio.

En informado, urĝas doni prioritaton al la TTT-ĉeesto de UEA, ĵus modeste komenciĝinta per paĝaro ĉe <http://uea.org/>. La Estraro decidis ke krom la ĝisnuna Komisiono pri Interreto, ankaŭ estrarano, Kalle Kniivilä, respondecu ĉi-kampe.

Okazis plurhora komuna trakto kun la TEJO-estraro, kunsidanta samtempe kaj -loke. La du plej plugindaj agadkampoj komunaj montriĝis eksteraj rilatoj kaj aranĝoj pri lingvaj rajtoj — terenoj kie TEJO estas veterane sperta.

La datoj de la UK en Tel-Avivo estis deciditaj: 25 julio-1 aŭgusto 2000. La Estraro aprobis la konsiston de LKK, kun Amri Wandel ĉekape. Pri la UK

en Zagrebo (2001) oni konstatis ke la preparoj tre bone progresas, kun forta apogo de urbaj kaj ŝtataj instancoj. Por UK en 2002 kandidatas Fortaleza (Brazilo) kaj Kortrijk (Belgio). Osmo



De maldekstre kaj malsupre, laŭhorloĝe: Osmo Buller, Kalle Kniivilä, GBEGLO Koffi, Michela Lipari, Atilio Orellana Rojas (observanto de ILEI), Renato Corsetti, Petro Chrdle, Kep Enderby

Buller esploras persone ambaŭ lokojn antaŭ la Berlina UK.

La Estraro konstatis kun zorgo ke, malgraŭ altiĝo en 1998 (kiun kaŭzis aliĝemo al populara UK en Francio), la membraro long-perspektive tendencas malkreski. Inter la pluraj kaj kompleksaj kaŭzoj unu sendube estas ke la sistemo de oficialaj perantoj, aĝa plurajn jardekojn, bezonas adapton al la necesoj de la nuno.

Ĉe tia konjunkturo, des pli gravas la kvalito de la servoj de UEA. La Libro servo spertis tre bonan jaron 1998

(vd. marto, p. 54), sed por daŭre sukcesi ĝi devas ofrtigi la ofertojn kaj lanĉi novan katalogon: farote en la nuna jaro. La Jarlibro estos dissendita komence de junio. Nia revuo klopodos superi sian malfruemon. *Kontakto*, redaktata kaj presata de Sabira Ståhlberg en Bulgario, aperas tre regule, kun altkvalita enhavo.

Por la periodo 1999-2001 la Estraro aprobis 47 ĉefdelegitojn (4 pli ol pasintjare); novaj estas Agnar Fitjar (Norvegio), Symilde Ledon (Brazilo), Wolfgang Schwanzer (Germanio), TAHIRA

Masako (Japanio), Alida Zigmundē (Latvio).

La Estraro kontentis pri la financa evoluo en 1998, kiu bone sekvis la buĝeton. La deficiito montriĝas iom malpli alta ol estis buĝetite (17 500 gld.). En 2000 tamen apenaŭ eblos eviti kreskon de la deficiito. Tiam la unuan fojon eniros la buĝeton la antaŭpagoj por la oficistaj pensioj (30 000 gd.), dum aliflanke

la malkresko de kotiz-enspezoj en unuamondaj landoj minacas ne halti. (La baza kotizo, MA por Nederlando, en 2000 estis fiksita je 48 eŭroj, t.e. 105,78 gld. anstataŭ 105 gld. en la nuna jaro.) ★

Cent jaroj (1896-1996) da stratoj, placoj, monumentoj, bustoj, kulturcentroj, tabuloj, parkoj, pontoj, asteroidoj en unu libro

HUGO RÖLLINGER

Monumente pri Esperanto

Redaktis Thomas Bormann. Rotterdame: UEA, 1997. 111p. 86 fotoj kaj pluraj tabuloj. ISBN 92 9017 051 4. 24cm. Prezo: 18,00 gld. (Triona rabato ekde 3 ekz.)



Esperanto en radio



Internaciaj radioelsendoj en Esperanto

(horoj laŭ UTC)

Ĉiutagaj elsendoj

06:00-06:30*	Pola R. Varsovio	Sat (1)	Eŭropo
08:30-09:00*	Pola R. Varsovio	Sat (1)	Eŭropo
11:00-11:27	Ĉina R. Int.	9535, 7170	Azio Orienta
13:00-13:27	Ĉina R. Int.	11600, 11840	Azio Sudorienta
13:30-14:00*	Pola R. Varsovio	7285, 7225	Eŭropo
18:00-18:30*	Pola R. Varsovio	7205, 6095	Eŭropo
20:00-20:27	Ĉina R. Int.	7405, 9965	Eŭropo
22:30-22:57	Ĉina R. Int.	9860, 11700	Ameriko Latina
0:00-24:00	Estonia R.	http://www.er.ee/Tallinn/	
0:00-24:00	WRN / Pola R.	http://www.wrn.org/ondemand/poland.html/	

Dimanĉaj elsendoj

04:05-04:30	R. Aŭstria Int.	6155, 13730, Sat (2,6)	Eŭropo
07:00-07:30	R. Havano Kubo	9820	Azio Pacifika, Ameriko Norda
14:05-14:30	R. Aŭstria Int.	6155, 13730, Sat (2,6)	Eŭropo, Afriko Okcidenta
15:00-15:30	R. Havano Kubo	11760	Ameriko, Karibio
19:20-19:30*	R. Vatikana	527, 1530, 5885, 4005	Eŭropo
19:20-19:30*	R. Vatikana	Sat (3)	Ameriko
19:30-20:00	R. Havano Kubo	13715	Eŭropo, Mediteraneo
22:00-22:30	R. Havano Kubo	13715	Eŭropo, Mediteraneo
23:05-23:30	R. Aŭstria Int.	6155, 9870, 13730 Sat (2,6)	Eŭropo, Ameriko Latina
23:30-24:00	R. Havano Kubo	11760, 6070	Ameriko, Karibio

La dimanĉa elsendo el Vatikano okazas ankaŭ dum kristanaj festotagoj, samhore.

Dum aliaj tagoj

19:20-19:30*	R. Vatikana	1611, 6185, 9645	Eŭropo (ĵaŭde)
19:20-19:30*	R. Vatikana	Sat (4)	Azio, Afriko (ĵaŭde)
19:20-19:30*	R. Vatikana	1611, 6185, 9645	Eŭropo (merkrede)
19:20-19:30*	R. Vatikana	Sat (4)	Azio, Afriko (merkrede)
20:00-20:20	RAI Internacia	5970, 7120, Sat (5)	Eŭropo (sabate)

*Programo kies horo estas konstanta laŭ MezEŭropa Tempo (do ŝanĝiĝos ekde 99. 10. 30). Nuntempe, MET=UTC + 2 h.

Sume, ĉiusemajne ĉirkaŭ 31:11 da elsendoj.

Satelitaj indikoj

(nomo kaj pozicio de satelito, frekvenco kaj polarizado [+ nomo de la televid-kanalo], frekvenco de la aŭda subportanto)

- (1) Pola R. Varsovio Eutelsat II F6 13 E (Hot Bird), 11.474 GHz Hpol (TVPolonia), 7.38 MHz
- (2) R. Aŭstria Int. Astra 19.2 E, 11.141 GHz Hpol (kanalo 45, Bayern 3), 8.10 MHz, per Astra Diĝita Radio (ADR)
- (3) R. Vatikana Intelsat 603: 34.5 W, 4097.75 MHz LHCP, aŭda kanalo A-1 (Atlantiko, Amerikoj)
- (4) R. Vatikana Intelsat 704: 66 E, 4152.45 MHz RHCP, aŭda kanalo I-1 (Azio, Afriko)
- (5) RAI Internacia Eutelsat II F6 13 E (Hot Bird), 11.446 GHz Vpol (Rai Due), 7.56 MHz
- (6) R. Aŭstria Int. Astra 19.2 E, 12.292 GHz Hpol, en ORF-DVB-Bouquet, SR 22.000, FEC 5/6

Fonto: OSIEK-AERA, Amikaro de Esperanto en Radio
<http://OSIEK.org/AERA/>

Polaj perdoj kaj gajnoj

Post la ĵusaj ŝanĝoj ĉe la Esperanto-elsendoj de Pola Radio (vd. apr., p. 68), ni petis la estron de la E-redakcio, Andrzej Pettyn, komenti ilin.

Unuflanke mi ĝojas ke niaj elsendoj tutmondiĝis kaj estas aŭskulteblaj per ret-radio kie ajn en la mondo, aliflanke mi bedaŭras ke oni forprenis de ni la vesperan satelitan elsendon. Fakte ni rajtas nun satelite elsendi matene, eĉ du fojojn, sed tiam povas aŭskulti nin nur personoj kiuj ne laboras. Donante prioritaton al orient-eŭropaj lingvoj, speciale al la rusa, bjelorusa kaj ukraina, oni ne volis kompreni ke ankaŭ E-o estas "orient-eŭropa lingvo", en la senco ke la E-elsendo de Pola Radio havas en Rusio, Bjelorusio kaj Ukrainio multnombrajn aŭskultantaron. Sed tamen ni lasu la bedaŭradon kaj ĝoju pri tio kion ni disponas. Des pli ke en iu momento la estonteco mem de niaj Esperanto-elsendoj ne estis firma.

Kion vi planas en la nova situacio?

Ni volas pli vaste utiligi la ret-radion por disponigi al la tutmonda e-istaro aktualaĵojn pri tio kio okazas en Pollando kaj pri la aplikado de nia lingvo, por inspiri per bonaj ekzemploj al pli energia agado. Tiucele ekz. jam en majo kaj junio ni klopodos prezenti la agadon de ĉiuj fakaj organizaĵoj per telefonaj kaj retaj intervjuoj. Eble tio iom kontribuos al la kongrestemo, kiu ja rilatas al tutmondiĝo. Samtempe ni esperas ke ĉiuj lokaj E-gazetoj diskonigos la aŭskulteblon de niaj elsendoj per ret-radio, atingebla per <http://www.wrn.org/ondemand/poland.html/>, kaj kunlaboros kun ni. Dezirantoj ricevos detalan ret-informilon pri la kadra semajna programo. Nia adreso: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, PL-00977 Varsovio, Poŝtfako 46, Pollando; ☎+48/22/645-59-17; ✉pettyn@radio.com.pl; http://www.radio.com.pl/piatka/esperanto_p.html/.

Retadresoj

Radio Aŭstria: ✉roi.esperanto@orf.at; <http://www.orf.at/roi/esperanto/>
Ĉina Radio: ✉cri@box.cri.com.cn; <http://www.cri.com.cn/>
Estonia Radio: ✉tonu@datanet.ee
Havana Radio: ✉kubesp@ip.etcscu.cu; <http://www.radiohc.org/distributions/freq-esp.html/>
RAI Internacia: ✉silviaradio@rai.it; <http://www.international.rai.it/radio/pola.htm/>
Vatikana Radio: ✉mc6778@mclink.it; http://www.vatican.va/news_services/radio/

"Sen instruado velkos nia movado"

La 75-jara doc. Vasil Pistoli, prezidinto (1991-95) kaj Honora Prezidanto de Albana E-Ligo, estas unu el la patroj de la albana movado. Intervjuis lin por ni Bardhyl Selimi Mezini, delegito en Tirano, en februaro.

■ Kiel vi konatiĝis kun la internacia lingvo?

En 1957, kiam mi deĵoris ĉe la konstru-ministrejo en Tirano en sama oficejo kun la honorinda Ĉefo Fico, la aŭtoro de la unua albanlingva ŝlosilo, vizitis lin la ambasadoro de Vjetnamio en Moskvo, eminenta e-isto kaj pacmovadano. Mi scivolis pri la mirinda lingvo kiun li parolis, kaj kiun mi parte komprenis pro miaj scioj de la franca kaj bulgara. S-ro Ĉefo donacis al mi sian E-ŝlosilon, kaj en la nacia biblioteko mi trovis italan instruilon, el kiu mi eklernis. Post kelkaj monatoj atingis min leteroj el Italio kaj Francio. Kial do? La vjetnamo publikigis mian adreson en *El Popola Ĉinio*. Jaron poste frapis ĉe mia oficejo germana maljunulo el Dresdeno, Erich Wald, kiu konis min same per *EPC*. Kun li unuafoje mi interparolis Esperante.


■ Ĉu vi korespondis en Esperanto dum la totalisma reĝimo?

Fakte, la korespondado suspektigis min al la sekreta polico. En 1965 la poŝtisto anoncis ke koverton el Italio mi devus mem preni en poŝtofiĉejo. Sed tie oni diris ke mi ne povas ricevi ĝin, konsilante tamen subskribi dokumenton pri ricevo. Mi ne subskribis, timante provokon. Kiu scias, eble pro mia korespondo mi neniam povis vojaĝi eksterlanden ĝis la 90-aj jaroj?

■ Kiel vi kontribuis al nia movado?

Kun s-ro Ĉefo jam en 1958 ni sukcesis aranĝi kursojn por laboristoj kaj studen-

toj. En 1967 mi tradukis kaj sukcesis eldoni je mil ekzempleroj libreton pri nia



Vasil Pistoli (maldekstre) kun Bardhyl Selimi Mezini

nacia heroo Skanderbeg, sed nur ono de tiuj mil atingis legantojn, ĉar superaj partiaj organoj malpermesis la libreton, kune kun pluraj aliaj. Ni sukcesis produkti ankaŭ turisman filmon pri la urba muzeo de Gjirokastra, dublitan Esperanten per mia voĉo. Tiun filmon certe havas la arĥivo de la nacia filmstudio. En 1962-63 s-ro Ĉefo provis akiri permeson ĉe superaj edukinstancoj por enkonduki E-on en lernejojn, sed venis nur malaprobo senmotiva. Nuntempe, de printempo 1995, lernejdirektoroj rajtas inkluzivigi E-on kiel studobjekton.

■ En 1991 vi eldonigis tre bonan lernolibron pri Esperanto.

Mi ekverkis ĝin jam en 1959. Ĝi estis presita modeste en la Hidrometeorologia Instituto, kie deĵoras filo mia. Tie presiĝis ankaŭ, en 1993, *La Nova Realismo* de B. Vogelmann, kiun mi albanigis kun helpo de fama lingvisto, Miĉo Samara.

■ Vi ankaŭ instruas la lingvon.

Jes, ĉar sen instrua laboro nia movado certe velkos kaj finfine fiaskos. Tial kun la kolegoj ĉe Albana E-Ligo, tuj post la fondiĝo en 1991, ni organizis kursreton en la ĉefurbo kaj en distriktoj. En la unuaj monatoj de 1993 ni starigis kursojn en la Tirana Universitato, post preleĝoj al la studentoj de la fremdlingva fakultato. 75 studentoj el la tuta lando entuziasme partoprenis en du grupoj, kaj 22 el ili akiris atestilon. Pliaj kursoj malfermiĝis i.a. en la apuda fremdlingva mezlernejo kaj en pedagogia mezlernejo, en gimnazioj.

■ Krom instrui, gravas informadi.

En 1993 mi aperis en televida programo pri E-o kaj poste en radio. Same faris kolegoj diverstempe. En la sindikatista ĵurnalo *Pasqyra* mi longe artikolis pri la intima ligo de Esperanto kun laboristaj celoj.

■ Fine: ĉu vi vizitis alilandajn e-istojn?

Jes, en 1991 mi vojaĝis al Sofio, kie antaŭ jardekoj mi studis inĝenieradon. Agrable mi memoras la samideanojn tie, viglajn kaj akompanemajn. En 1996 mi partoprenis kunvenojn de la gastama Novjorka E-Societo. Aparte brile impresis min tie s-inoj Cécile Low kaj Rochelle Grossman. Koresponde mi interŝanĝis mesaĝojn kun d-ro Humphrey Tonkin kaj s-ro William Harmon.

En aŭgusto 1995 mi demisiis de la AEL-prezidado pro familiaj okupoj, restante Honora Membro. Kompreneble neniel mi eksigis min el la kontribuado al nia landa movado. ★

UK Ĝis la 25-a de aprilo al la Berlina UK (31 jul.-7 aŭg. 1999) aliĝis 2250 personoj el 55 landoj.

NAVIGE TRA TTT-PAĜOJ

Jen kelkaj verdaj gutoj el la
inform-oceano de Tut-Tera
Teksaĵo. Sciigu nin pri pluaj
konsultindaj paĝoj Esperantaj!



BRAZILLO

Kultura Esperanta Centro: <http://pagina.de/kec/>. Kun vortareto E-portugala. Sub "Vidpunkto", artikoloj kaj literaturaĵoj de aŭtoroj plejparte brazilaj, sed ankaŭ du noveloj de Julio Ramón Ribeyro (Peruo), bele tradukitaj de Harald A. Helfgott. Kultura Centro de Esperanto (Campinas) fieras pro facile memorebla, informade utila adreso: <http://www.esperanto.cc/>. Principe, ".cc" indikas la hind-oceanan Kokos-Insularon; sed ĉi tiu, samkiel Tuvalu ("tv") kaj iuj aliaj landetoj, disvendas sian finaĵon. KCE kunordigas la retkurson por portugallingvanoj, kun pli ol 300 lernantoj, kaj dissendas informojn tra komunuma televidstacio.

FIZIKO

"Pordo al informoj pri fiziko en Esperanto": <http://fiziko.org/>

MALTO

Malta E-Societo: <http://maltaesp.hypermart.net/>, kun informoj pri la 7-a Turisma Semajno en Malto (4-10 septembro).

MUZIKO

EUROKKA: <http://www.bekkoame.ne.jp/~taon/eurokka/>, zorge de ONO Takao. *Rok-gazet'*: <http://www.sciuro.demon.co.uk/rokgazet/>. Komplementa al la papera versio, nun n-ro 9.

Solo en Esperanto: <http://www.ciudadfutura.com/esperanto/solo/>. Kun 5 eroj el lia albumo *Astral Egoency* (1998), en Real Audio. Baldaŭ intervjuoj. Solo ĵus lanĉis sian novan kompaktdiskon *PoLimoRFiA ArKiteKniA*.

RADIOAMATOROJ

Internacia Ligo de Esperantistaj Radioamatoroj: <http://ttt.esperanto.org/internacia/> ILERA. Anglalingva, kun historio de ILERA ekde la fondo en 1970.

TEOLOGIO

Projekto TETH indeksas teologiajn revuojn: <http://filipo.citeweb.net/teth/>. Rilata diskutlisto: teth@sorengo.com

TRADUKADO

Esperanta beletro hungare (parte ankaŭ la originala teksto): <http://www.mek.iif.hu/porta/szint/human/szepirod/vilagir/eszperan/eszperan.mek/>. Verkoj de Balbin, Boulton, Conterno, de Kock, Forge, Gabrielli, Kurzens, Rosbach, Sekelj k.m.a., traduke de Jozefo E. Nagy. La trovejo estas la subfako "nuntempa mondliteraturo" de la oficiala Hungara Elektronika Biblioteko, el kies 31 eroj ĝi estas unu el la plej ampleksaj.

UNESKO

Unesko-premio al TTT-paĝo: <http://www.unesco.org/webworld/webprize/winners/index.htm/>. Unuafoje Unesko aljuĝis tian premion pasintjare. La paĝo <http://cosmo.com.br/provedor/unesco/> prezentas (angle, france, hispane, portugale kaj en Esperanto) la vivon, arton kaj tradiciojn de du brazilaj indianaj triboj, la kamajuroj kaj la urubu-kaaporoj. Kreis la paĝon Silvia Lunazzi — filino de José J. Lunazzi (vd. p. 90; delegito en Campinas, Brazilo) — kaj Nadia Karasawa.

MALFERMA TAGO

Sukceso iĝas preskaŭ rutino por la Malfermaj Tagoj de la Centra Oficejo, se juĝi laŭ la nombro de vizitantoj kaj, precipe, laŭ la ĉiam familia etoso.

Marjorie Boulton kat(t)enas la atenton!



Brita sprito ne maltrafis la celatojn.

La 24-an de aprilo, sabate, 85 esperantistoj gastis en la Roterdama domo de UEA, veninte el 12 landoj: duono el Nederlando, sed aliaj el Germanio, Francio, Hispanio, Italio, eĉ Litovio, Pollando kaj Usono.

Atendis ilin kvin okazejoj tra la domo: En salono Zamenhof, Marjorie Boulton tri fojojn prelegetis kaj pacienco respondis al demandoj pri Esperanta verkado kaj... nu, pri katoj. (En la vicoj de la publiko — ni ne ŝercas! — sidis eĉ hundo.) En la Libroservo,

O, DEKAN FOJON



Osmo Buller (maldekstre)
prezentas kukon faritan de
Janina Bańkowska (meze)
por la okazo.



Ĉiuj fotoj: François Vauthier

kun la malferm-tage kutima rabato de 10%, vendiĝis varoj je 2317 eŭroj — i.a. ĉiuj disponeblaj titoloj de Marjorie Boulton. Ĉambro Epstein proponis bazon de esperantaĵoj. En Biblioteko Hodler okazis senĉesa montrado de vidbendoj. Laste sed ne balaste, refreŝigaj kafo, teo kaj kukoj ĉiam atendis pretaj en la babilemiga kaf-ĉambro.

Jam nun vi povas noti en via agendo la daton de la sekva Malferma Tago: la 27-a de novembro 1999, sabato. ★



Venu Via Regno

Ni proponas senpagan

BIBLIAN STUDKURSON

Se mankas al vi Biblio,
ni senpage provizos preson.

*Via Vorto estas lumilo
por miaj piedoj
Kaj lumo por mia vojo.*

Psalm 119:105

INTERNACIA BIBLIO-MISIO
50 Wissage Rd., LICHFIELD,
WS13 6SW ANGLIO



INDIĜENAJ DIALOGOJ

Por la Esperanto-staĝo anoncita por anoj de indiĝenaj popoloj (vd. feb., p. 25) alvenis tiom da aliĝoj ke fariĝis necese revizii la kursoplanon. Laŭ la nuna intenco, okazos eĉ du kursoj: por 20 personoj en la unuaj tri semajnoj de septembro, kaj por 12 kursanoj de 21 novembro ĝis 12 decembro.

La projektanoj trovis pluan subtenanton: Internacia Instituto por Komunikado kaj Evoluo kompetentas same pri indiĝenaj aferoj kiel pri modernaj komunikiloj.

Pluaj ideoj, helpo, subteno, kontaktoj bonvenaj: Sylvain Lelarge kaj Bessie Schadee, Narwal, Oud Clingendaal 7, NL-2245 CH, Wassenaar, Nederlando; ☎+31/70/517-75-23, ☎517-66-82; ✉sylvain.lelarge@usa.net.

Kvinlingva informpaĝo, danke al Wouter Pilger: <http://hwivw.narwal.com/>.

STUDU INTERLINGVISTIKON

En Pollando, Universitato Adam Mickiewicz anoncas eksteran postdiplomatan studadon 3-jaran sub gvido de d-rino Ilona Koutny. Invititaj prelegi estas i.a. profesoroj M. Duc Goninaz, H. Tonkin kaj J. Wells, d-rinoj V. Barandovská-Frank kaj K. Smidéliusz. Surloka kurso okazos ĉiusemestre (septembre kaj februare). La finstudintoj ricevos atestilon. Aliĝo por 1999/2000 eblas ĝis 15 aŭg. Postuloj: finita mezlernejo, bona scio de E-o. Kotizo por unu semestro: 400 USD (por nepagipovaj landoj 90 USD). Informoj: d-rino I. Koutny, Lingvistika Instituto de UAM, Międzychodzka 3-5, PL-60-371 Poznań, Pollando; ☎/☎+48/61/861-85-72; ✉ikoutny@amu.edu.pl.

Studemuloj bonvenas ankaŭ ĉe Universitato ELTE (Budapeŝto), ĉe kies katedro pri ĝenerala kaj aplika lingvistiko oni studas interlingvistikon kaj e-ologion ĉe d-rino Zsuzsa Varga-Haszonits (vd. feb., p. 37). Nehungaroj povas aliĝi al 3-jara kurso diplomiga. Informoj: Univ. ELTE, Esperanto-Fako, Piarista köz 1, HU-1061 Budapeŝt; ☎+36/1/266-56-99; ✉hekaszs@isis.elte.hu.

Reagoj



La risko de senmaskigo

De' Giorgi (marto, p. 53) admonas mensogi al ĵurnalistoj. Jes, ekzistas okazoj kiam mensogo ne estas malmorala. Sed mensogo (eĉ pravigebla) havas gravan mankon kaj tial evitindas — ĝi riskas esti senmaskigita. La nombro de la Esperanto-parolantoj estas kalkulita de prof. Culbert (vd. jan., p. 11). Sed ĉu estas grava diferenco inter miliono kaj 10 milionoj? Tia nombro impresas en Lihtenŝtejno kaj ne impresas en Ĉinio.

Aleksandr Fiŝkin - Rusio

Tio eĉ ne estas blufi!

Tute pravas A. de' Giorgi ke "utilas takte blufi". Neniu scias kiom da homoj parolas Esperanton en la mondo. Se konsideri ĉiujn kiuj iam ion lernis, rezultos grandega nombro. Ĉu blufa? Sed ja 99% de la homoj kiuj

asertas scii la anglan lingvon, reale povas nur kun granda peno kompili kelkajn simplajn kaj banalajn frazojn. Tamen ja "absolutan venkon" de la "internacia"



(fuŝ)angla lingvo oni argumentas nombrante ĝuste tiajn homojn!

Somere de 1985 *Pravda*, la ĉefa organo de la reganta Komunista Partio de Sovetunio, neatendite (perestrojko!) aperigis favoran artikolon pri

Esperanto kun mencio pri 20 milionoj da esperantistoj en la mondo. Ekde tiam mi ĉiam referencas al ĝi. La saman ciferon mi plezure enmetis en porinfanan enciklopedion kun eldonkvanto de 100 mil (vd. okt. '98, p. 182). Espereble tio kuraĝigos romantikemajn adoleskulojn lerni nian lingvon, kaj la "blufa" nombro iom post iom proksimiĝos al la realo...

Valentin Melnikov - Rusio

Vorto kiu diras multon

En la letero de de' Giorgi estas uzata la vorto *kabei*. K. Kniivilä en sia respondo implicate agnoskas tiun terminon. Karaj esperantistoj, legantoj de *Esperanto*, ĉu vi ne opinias ke homa grupo en kies lingvo ekzistas tiu, aŭ tia, vorto (uzata senhumure!), estas sekto — aŭ pli ĝentile dirite, eklezio?

Michel Duc Goninaz - Okcitanio

La propra ritmo de Ameriko

En kelkaj lastaj numeroj plurfoje oni mencias la aktivadon en Ameriko kiel esperplanan por la movado. Amerikano de 50 jaroj kaj esperantisto de 8 jaroj, mi ĝojas ke nia klopodo daŭrigi kaj kreskigi la movadon estas rimarkata de eŭropaj kaj aliaj eksterlandaj samideanoj. Ni multe respektas la eŭropan movadon, sed ni scias ke ni ne povas fari same, pro la malsamaj kondiĉoj. Permesu al mi fari komparon kun muzika kreado: la bazaj instrumentoj kaj harmonioj venas el Eŭropo, sed la amerika muziko havas propran ritmon kaj sintenon.

Tial la esperantistoj de landoj pli riĉaj bone helpas la movadon en neriĉaj landoj se ili permesos kopii kaj libere uzi iliajn materialojn. Importi librojn, muzikaĵojn ktp kostas multe, kaj ĉar ni ne kopias, ni ne disvastigas aferojn kiuj povus instigi komencantojn koni la amplekson de la E-movado, trovi vojon en fako laŭ ilia intereso. Gravas ankaŭ la helpo kiun ni povas ricevi de vizitantoj. La ibero-amerikaj landoj postulis kaj ankoraŭ postulas la aprobon de Eŭropo por ĝeneralaj ideoj. Tiun klasikan rolon de Eŭropo nuntempe eĉ pli forte plenumas Usono, kaj montri al niaj komencantoj la ekziston de usonanoj kiuj konsentas kun la ideo Esperanto certe helpas por forigi barilojn.

El la poŝtkesto

Du lingvaj proponoj

Panjo kaj paĉjo. Ĉi tiuj du vortoj estas formitaj per pseŭdosufiksoj, kiuj algluiĝas ne al radiko sed al radikstumpo: jen fakta rompo al la principo de reguleco. En mia broŝuro *Esperanto, lingvo planebla* mi prezentis tre simplan proponon por forigi tiun mankon: oni enkonduku du novajn substantivajn radikojn, *mama-o* kaj *papa-o*. Se uzataj en eliziita formo, ili fariĝus *mama'* kaj *papa'*, do tute internaciaj vortoj, sed respektantaj la regulojn de E-o. Kompreneble la ĝisnunaj *panjo* kaj *paĉjo* restus.

Literumado. En la itala lingvo, kiam ĉe telefono oni bezonas literumadi vorton, oni uzas por la 21 literoj de la alfabeto nomojn de italaj urboj. En aliaj lingvoj oni uzas liston de propraj nomoj. Ambaŭ sistemoj havas la avantaĝon ke la nomoj estas facile memoreblaj aŭ anstataŭigeblaj per alia nomo same facile rekonebla. Por Esperanto, la listo prezentita en la UEA-jarlibro konsistas el ordinaraĵoj, kiujn oni devas parkere lerni. Kelkfoje misprononco povus esti miskomprenon: ekz. se *zinko* estas komprenata kiel *sinko*. Tial mi sugestas sistemon similan al la itala, kun plejparta uzado de konataj geografiaj nomoj. Jen

ekzemplo: Azio, Brazilo, Cipro, Ĉinio*, Danlando, Eŭropo, Francio, Germanio, Gibraltaro, Hungario, Ĥaoso, Italio, Japanio, ĵurnalo, Kanado, Litovio, Maroko, Nederlando, Oceanio, Portugalio, Ruslando, Svedio, Ŝetlandoj, Turkio, Usono, Ŭesto, Venezuelo, Zairio. Por la "fremdaj literoj" oni diru, kiel kutime: *ku, ikso, ipsilono, germana vo*. Tio havus la avantaĝon ke oni povus diri ekzemple Hispanio anstataŭ Hungario, Norvegio anstataŭ Nederlando aŭ Irlando anstataŭ Italio, sen risko je miskomprenoj.

*Oni povus diri Ĉinujo, Francujo ktp, se preferate.

Umberto Broccatelli - Italio

Bill Maxey bone verkis pri nia agado per utila artikolo (marto, p. 42-44), sed li faris logikan kaj gramatikan eraron: li uzas la esprimon “la tri Amerikoj”, sed Ameriko estas unu kontinento, ne tri.

José J. Lunazzi - Argentino/Brazilo

Arto malnecesas

Mi kiel abonanto kaj leganto de *Esperanto* apelas ke vi tuj ŝanĝu la formon de la enhavlisto. Post vere multaj jaroj da ties profesia prilaboro, de la marta numero de 1998 mi vidas enhavliston en ofende diletanta kaj fuŝa formo. Pasis tuta jaro kaj, strange, ĝi senŝanĝe aperaĉas. Ĝia prilaboranto finfine lernu ke enhavlistoj ne estas artverkoj kaj ke ili devas esti forme kiel eble plej simplaj. Estas neakceptebla “ornami” ilin per fotoj, desegnaĵoj, kadretoj ks. “Artaj” enhavtabeloj simple estas neoportunaj por lego, neretraserĉeblaj kaj konsekvence nelegataj. Tiaj aperas ĉar kelkaj komputilistoj deziras vaste eksponi sian lerton uzi ĉiujn komputilajn funkciojn en ĉiuj eblaj situacioj. Sed porlegantula, profesia enhavlisto enhavas neniun “arton”. Mi petas do ke vi revenu al la antaŭa, ĝusta formo.

Piotr Bors - Pollando

Red.: Post pli ol jaro da ĉi-forma enhavtabelo, via plendo estas la unua pri ĝi. Ŝajne, do, ne nur ni opinias plibonigi ĉi tiun adaptigon al la nunaj tendencoj de magazina grafikarto. Leganto nuntempe preferas tuj ĉe malfermo ricevi panoramon pri la numero — bildoj kaj varia tipografio havas ŝlosilan rolon en tio. Seka titolisto kontentigas nur kompilantojn, sed averaĝa leganto ĝin evitus.

Ĉu ni preterdormos informeksplodon?

Ĉiu lingvoj de la mondo havas la naturan taskon disponigi informojn kaj ebligi ties interŝanĝon. De internaciaj lingvoj la publiko des pli atendas tion. Granda moderna fonto de informoj, kies signifo ĉiutage kreskas, estas Interreto, en kiu la retanoj serĉas ĉiajn informojn imageblajn. Kutime ili trovas la informojn en du lingvoj: en la devenlingvo kaj angle. Tiel kreskas en la reto anglalingva tutmonda enciklopedio, superanta ĉiujn ĝisnunajn libroformajn. Troviĝas en ĝi ankaŭ beletraj biblioteko, ekz. de usonaj klasikaĵoj (Poe, Hawthorne, Twain, Melville ktp). Eĉ pri la plej famaj eminentuloj de mia ĉeĥa nacio, Hus (1370-1415) kaj Komenio (1592-1670), mi trovis biografiojn angle, sed ne ĉeĥe.

Por Esperanto jen danĝero kaj espero: se ni preterdormos tiun ĉi informeksplodon, niaj klopodoj povos fiaski; se ni preparos konkurencon enciklopedion E-lingvan, ni proksimiĝos al la sopirata venko. Nur se troveblus informo angle kaj Esperante, povos la facileco de Esperanto ludi rolon. Se la informoj estos nur anglalingvaj, Esperanto restos por la serĉanto senvalora.

Samideanoj jam preparis en la reto multlingvan inform-

sistemon pri Esperanto; estas akireblaj tie pluraj lernolibroj, gramatikoj, vortaroj, eĉ beletra biblioteko. Ĉar ĉiu nova libro nun estas kompostata komputile, la nombro de libroj en elektronika formo certe kreskos. Plue eblas skane enkomputiligi ankaŭ gravajn malnovajn librojn, kompreneble se la posedantoj de la aŭtoraj rajtoj aprobas.

naciaj historio, kulturo, urboj ktp. Fakaj asocioj povus same fari pri sia fako kaj famaj fakuloj. Nia movado, havanta 1700 retanojn (vd. marto, p. 57), povus realigi enorman enciklopedion, se ĉiu lando prilaborus siajn temojn.

Kunordigon kompreneble ne eblas trudi, nur proponi al volontuloj. TTT-paĝoj aliĝintaj al la enciklopedio havus



Jam ekzistas centoj da paĝoj en Interreto pri kaj en Esperanto; tamen ĉio kreskas spontane, sen kunordigo. Estus utile se UEA proklamus retan version de Kampanjo 2000, kiu daŭrus eĉ en la sekva jarmilo. Ekzistas ekstermovada Projekto Gutenberg, kiu klopodas kolekti literaturaĵojn en elektronika formo. Por nia movado eble taŭgus Enciklopedio Zamenhof, kun celo iom diferenca. E-lingvaj TTT-paĝoj estas de kvar specoj: de landaj asocioj, de fakaj asocioj, de gazetoj kaj de privatuloj. Estus bone se landaj asocioj, kun privatuloj, prilaborus informojn pri la

iun komunan signon kaj referencon al la enhavo de la enciklopedio, kiu ebligus trovi la deziratajn paĝojn kaj informojn. Certe necesus ia rekomendaro por la kunlaborantoj.

Kiam eblos trovi per Esperanto ne nur ampleksajn altkvalitajn vortarojn, sed ankaŭ enciklopediajn informojn pri sciuroj, astroj, komponistoj kaj teksmaŝinoj, tiam ni povos prave aserti ke Esperanto estas bone preparita por la funkcio de internacia lingvo — kaj la mondo ne povos tion ignori.

Miroslav Malovec - Ĉeĥio,
Dstarto@clavis.cz

“[Aperis] 3000-paĝa vortaro angla-ĉeĥa. . . Simile. . . kun la franca, germana, rusa kaj hispana. . . En Esperantujo ekzistas nur unu komparebla vortaro, la itala-Esperanta de Carlo Minnaja. . . Se ni havus similajn vortarojn almenaŭ en trideko da eŭropaj lingvoj, la mondo devus nin respekti, vidante la investitan laboregon. Sed unu hirundo printempon ne faras.” (M. Malovec)

“Ion ajn unufoje enkomputiligitan eblas reprodukti senfine. . . Ĉiu en la mondo, aŭ eĉ ekster ĝi (pensu pri satelita transsendo) povas ricevi kopion de libro enkomputiligita.” (El “Historio kaj filozofio de Projekto Gutenberg”)

MIROSLAV MALOVEC (1953)
enkomputiligis preskaŭ ĉiujn verkojn de Miloš Lukáš, po kvardekon da libroj eldonitaj en Ĉeĥio kaj da manuskriptoj (Cíchová, Karen, Pumpr k.a.), el kiuj jam deko aperis libroforme. Li redaktas Starto de Ĉeĥa E-Asocio ekde 1991.

Enciklopedio anglalingva: <http://www.encyclopedia.com/>. 17 000 koncizaj kapvortoj, multaj ligoj.


Enciklopedio Kalb: <http://www.panix.com/~kalb/>. Ĝis nun 270 kapvortoj en Esperanto.

Projekto Gutenberg: <http://www.gutenberg.net/>. Anglalingva. Dumilo da verkoj entajpitaj.

Projekto Kelter: <http://www.esperanto.cc/>. Iniciato simila al Projekto Gutenberg, el Brazilo. Du verkoj en Esperanto parte entajpitaj.

Usonaj klasikaĵoj: <http://www.americanliterature.com/main.html/>. Ĉiutage nova ĉapitro aldonata.

Virtuala Esperanto-Biblioteko: <http://www.esperanto.net/veb/>. Kun literatura fako, zorge de Don Harlow.



Recenzoj

Movado

Bonvena atako al dogmoj

Esperanto sen mitoj. Mensogoj kaj memtrompoj en la Esperanto-informado. Ziko Marcus Sikosek (1973). Antverpeno: Flandra E-Ligo, 1999. 311p. 21cm. € 24,00.



Multaj ne ŝatos ĉi tiun libron. Pleje ĝin malŝatos tiuj kiuj tre bezonas ĝin, kaj ili bedaŭrinde estas multaj. En sia kompetente verkita volumo kun bela eksteraĵo kaj flua lingvaĵo Ziko Sikosek atakas laŭvice ĉiujn sanktaĵojn de nia movado, ekde la fantaziaj taksoj pri miloj da e-istoj ĝis la genieco (kaj eĉ la kuracista honoro) de doktoro Zamenhof. Jam per si mem tia atako estas bonvena, ĉar ĝi devigas la leganton pripensi niajn dogmojn kaj konsideri kio estas grava en nia lingvo kaj movado. Des pli bonvena la libro estas ĉar la aŭtoro efektive enprofundiĝis en la temon kaj bone dokumentas preskaŭ ĉiujn siajn asertojn — la bibliografio ampleksas pli ol 30 paĝojn.

Iom probleme estas ke la aŭtoro havas samtempe du celojn: unuflanke li deziras frakasi la multajn mensogojn kaj memtrompojn kiuj persistas en nia movado, aliflanke li volas doni konsilojn pri ĝusta informado. La fokuso tamen restas ĉefe ĉe la malaperigo de mitoj — tute ĝuste, ĉar antaŭ ol informi eksterulojn, ni devas scii la veron pri ni mem. La unuavica merito de la libro troviĝas ĝuste en tio ke ĝi devigas ĉiun leganton alfronti la faktojn kaj mem pripensi sian sintenon.

Por lingva justeco

Kio ni estas kaj kion ni celas. Komentoj pri la Manifesto de la movado por la internacia lingvo Esperanto. Red. Renato Corsetti kaj Osmo Buller. Rotterdam: UEA, 1999. 24p. 30cm. € 5,50. Triona rabato ekde tri ekz.

Ĉi tiu libro estas serio de artikoloj, de sep mallongaj ĉapitroj (demostrateco, transnacia edukado, pedagogia efikeco, plurlingveco, lingvaj rajtoj, lingva diverseco kaj homa emancipiĝo), kiuj “pli funde prilumas la Manifestan (de Prago) septezon”, prezentante “koncize kaj dinamike, eĉ bataleme, la ĉefajn celojn, por kiuj ni aktivis”, laŭ la enkondukaj vortoj de Osmo Buller. La artikolojn verkis Frank Stocker, Duncan Charters, Katalin Smidélus, Renato Corsetti, Uwe Joachim Moritz, Mark Fettes kaj Spomenka Štimec. Aldoniĝas ilustraĵoj, belaj kaj klarvidaj poemoj de William Auld, Marjorie Boulton kaj Ignazio Buttitta (aparte tuŝa, tradukis Renato Corsetti), kaj interesaj eltiroj el *La rondo familia* de Nikola Rašić.

La artikoloj estas plenstopitaj per intereseĝaj kaj pensigaj ideoj; eblas mencii nur malmultajn ĉi tie. Aparte frapis min kiel montris R. Corsetti ke “la nuna


situacio ne estas eterna, kvankam ĝi povas ŝajni [...] tia”, K. Smidélus ke “Esperanto multe pli utilas por krei ponton

inter strukture malproksimaj lingvoj”, U. W. Moritz ke “ne sufiĉas la jura samrajtigo”, F. Stocker ke la lingvaj strukturoj de EU “estas fundamente maldemokratiaj”, kaj M. Fettes ke ekologia rigardo estas “la sola alternativo al amasa ‘lingvocido’”. Ĉu iu kritikato? Mi ne certas ke la libro, aŭ la Manifesto, sufiĉe substrekas la gravecon de okazantaĵoj en la lingva politiko de EU, kaj la ŝlosilan rolon de Francio kaj

Germanio (grandaj ŝtatoj kies lingvoj iĝas duarangaj) por decidi ĉi tiujn. Eble ne hazarde UK okazos en Germanio post Francio!

Mi forte rekomendas ĉi tiun belan libron, kiu kerne gravas por atingi lingvan justecon. Ĉar ĝi direktas sin eksteren, oni rapide traduku ĝin en aliajn lingvojn. Ne nur leginda, legenda!

Seán Ó Riain - Irlando/Pollando



Indas konstati ke la verko do ne estas ia ideala manlibro pri informado. Granda parto de la enhavo rilatas al detaloj de la movada historio kiuj ne havas ajnan rilaton al informado, sed ja meritas esti pli vaste diskonigitaj.

Iom agacas la emo de la aŭtoro ĉie kaj ĉiam trovi mitojn kaj fuŝajn asertojn. Eĉ la Praga Manifesto, kiun miloj da esperantistoj trovis subteninda kaj disvastiginda, estas laŭ Sikosek “forta kialo malesperi pri la t.n. esperanto-movado” (p. 259).

Simile malfavoran traktadon ricevas la honesta kaj realisma takso de prof. J. Lindstedt pri la nombro de la E-parolantoj, laste prezentita en ĉi tiu revuo (okt. '98, p. 165).

Frakasi estas pli facile ol konstrui, kaj post la sturmejo de Ziko Sikosek ne estas tute klare ĉu io restas post la mitoj — aŭ ĉu la tuta esperantistaro laŭ li konsistas nur el mitoj kaj mituloj...

Unu el tiuj konsiloj kiuj ja troviĝas en la libro, estas tamen tre memorinda: informado pri Esperanto estu ĝuste *informado*

Nudaj faktoj gravas por ni

Language Minorities and Minority Languages in the Changing Europe.
Red. Brunon Synak kaj Tomasz Wicherkiewicz.
Gdańsk: Uniwersytet Gdańsk, 1997. 419p.
24cm. Plejparte anglalingva. € 18,00.


Diferencigas inter lingvo kaj dialekto ĉefe la publika opinio. Ekzistas lingvoj kompreneblaj inter si (la dana, norvega kaj sveda, ekzemple), kaj dialektoj de la sama lingvo inter si nekompreneblaj. Difini dialekton kaj lingvon estas plejparte demando ne por lingvistoj sed por tiuj kiuj reprezentas la interesojn de la diversaj socioj kaj komunumoj. Lapenna pravis: "lingvo estas socia fenomeno"; sed tia estas ankaŭ la difino de lingvo. Ekzistas tra la mondo miloj da diversaj sistemoj de sin-esprimado — eventuale 7000 diversaj etnolektoj (lingvaj sistemoj de difinitaj etnoj). Tiuj hodiaŭ malaperadas kun konsterna rapideco, tiel ke, laŭ multaj fakuloj, duono ne plu ekzistos ene de du-tri jardekoj. Jam kvarono estas uzata de po malpli ol mil parolantoj. Plejparte tiuj etnolektoj estis neniam registritaj detale: eble nur 20% de la lingvoj de la mondo oni registris, kaj eĉ malpli iam ricevis detalan priskribon fare de specialistoj. Je la alia fino de la linio, deko da lingvoj havas po pli ol cent milionojn da parolantoj, kaj ilin parolas preskaŭ duono de la monda loĝantaro.

Tamen, estas mirinde kiel ofte malgrandaj lingvoj rezistas estingiĝon: la morton de kelkaj oni profetas jam de jarcento, kaj iel ili ne malaperas. Aliaj malgrandaj lingvoj eĉ fortiĝas, rezulte de nova sento de kultura aparteco, aŭ pro aliaj sociaj kaj ekonomiaj fortoj. Lingvaj diverĝoj, ekzemple inter la serba kaj kroata, okazas pro politikaj evoluoj. La procezoj de tutmondigo ne nepre kondukas al lingvomortoj.

Tiuj nudaj faktoj (aŭ duonfaktoj, ĉar la preciza monda lingva situacio estas mal-

pri Esperanto. Ne ĉiu volas lerni Esperanton, sed multo estas atingita, se oni sukcesas konsciigi pli vastan publikon pri tio ke Esperanto ne estas ia malsukcesinta utopia projekto, sed ekzistanta lingvo, kiun relative multaj homoj dise en la mondo parolas, lingvo, kiu havas sian propran literaturon, lingvo, kiun veraj homoj parolas. Jam tio estas revelacio por la plej multaj homoj, kaj tio estas simplaj faktoj — neniuj mitoj necesas.

Kalle Kniivilä - Finnlando/Svedio



facile konstatabla) gravas ankaŭ por ni, parolantoj de Esperanto, ĉar fortaj argumentoj por la utiligo de Esperanto devas esti bazitaj sur bona prijuĝo de la reala situacio. Lingvaj kaj komunikaj problemoj certe ekzistas jam de la komenco de la homaro, kaj la nocio ke ekzistas la lingva problemoj, kiun oni povus solvi per la Internacia Lingvo Esperanto, draste subtakas la komplikecon de la demando. Prefere ni parolu pri tio kiel Esperanto povas helpi solvi problemojn, aŭ doni novan aliron al malnovaj malfacilaĵoj.

Traktas tiujn demandojn la kvardeko da referaĵoj en tiu ĉi volumo (plejparte anglalingvaj), rikolto de la 6-a Internacia Konferenco pri Minoritataj Lingvoj (Gdańsk, 1996). La libro mem meritas la atenton de tiuj kiuj deziras akriigi siajn argumentojn por kaj pri Esperanto, kaj de interesatoj pri la tuta fenomeno de minoritataj lingvoj. Tamen, ni notu ke la referaĵoj plejparte traktas nur la eŭropan lingvan situacion, kiu ne estas tute sama kiel en aliaj mondopartoj. Ni notu la fakton ke inter la referaĵoj troviĝas artikolo pri Esperanto verke de Hans Erasmus — gratulinda iniciato liaflanke kaj salutinda evoluo flanke de la organizintoj de la konferenco. Tamen, la argumentoj de Erasmus por utiligo de Esperanto ne ĉerpas sufiĉe el la subtilaj analizoj kiujn oni trovas ekzemplitaj aliloke en la volumo. Aparte rekomendindaj estas la klaraj prezentoj de Majewicz kaj Ahlqvist en la komenco de la volumo, kelkaj referaĵoj pri eŭropa lingvopolitiko ĝenerale, kaj studoj pri unuopaj regionoj, ekzemple tiuj pri Skandinavio, Manksinsulo, Frislando kaj Slovenio.

Humphrey Tonkin - Usono

Muziko

"Ne donu tro"

Ne donu tro. Ĵak Le Puil. Thaumiers: la aŭtoro, 1994. 40 min. € 12,25.

Israelo ne ĉesas kanti. Tova Ben-Cvi. Tekstoj de J. Kohen-Cedek, J. Murĵan, A. Wandel. Tel-Aviv: ELI, 1993. Kun tekstofolio. € 9,50.

Edgar + Asorti. 1995. 42 min. € 6,90.

Tri muzikkasedoj, tri etosoj, unu impresoj: Esperantujo maturiĝis ankaŭ kadre de populara muziko. Kaj ankaŭ la modernatempa tekniko estas atinginta ĝin: la elektronikaj akompanaĵoj ne plu limiĝas al nur akustikaj helpoj, sed ofte plene anstataŭas naturecajn instrumentojn — ĉu bonvene, tion taksu la preferoj, la aŭdokitimoj de la aŭskultantoj, ĉar tamen estas ankoraŭ diferencoj inter la sonkvalitoj.

Estas interese aŭskulti Ĵ. Le Puil kun malmema akompanado de sintezilo, same Tova Ben-Cvi kun artefarita orkestro, kaj la junan, foje iom pene kantantan Edgaron, kiun gajetose, sed monotone akompanas elektronikaj frapinstrumentoj. En la Espe-

ranta komunumo tiaj muzikaĵoj tamen trovas siajn ŝatantojn. Sed ĉu estas vere necese simple lingve transporti al Esperanto diversnaciajn muzikajn etosojn (tie ĉi la rusen, la francan, la israelan/jidan)? Ĉu Esperantaj tekstoj, enhave foje ja bonaj, kapablas krei Esperantan muzikan kulturon? Demandoj kiujn la produktintoj, same kiel la ĝuantoj, certe ne elmetos. "Ne donu tro" — ĉu tro orgojla peto?

Se la kasedoj la recenzinton bone atingis, nur la israela kasedo disponigas fidindajn informojn pri tekstoj, kantisto kaj akompanado; Edgar havigas skribe nur la tekstokomencojn, sed montras sin kolorabilde. Ĵ. Le Puil, kies kasedotitolo inspiris la fraplinion de tiu ĉi recenzo, aldonis al la kantotitoloj nomojn, kiuj tamen lumos nur por iniciatoj. Plia, pli grava kritikpunkto: senescepte la muzikistoj forte perfortas la Esperantan prozodion, kvankam en tiu ĉi triopo ne troviĝas (bonvolu pardoni la mension de oftaj spertoj) hungaro... Tutaj serioj da lingvaj misakcentoj kapablas fortimigi ankaŭ la plej bonvoleman aŭskultanton. Sed eble tiaj muzikaĵoj tute ne celas konsciajn aŭskultantojn?

Franz-Georg Rössler - Germanio

Estas kiel estas

La vojo de serpento sur roko (1983). Torgny Lindgren (1938). 1997. 84p. € 5,70.
Doktoro Glas (1905). Hjalmar Söderberg (1869-1941). 1998. 89p. € 6,60.
Tio konvenas! (1839). Carl Jonas Love Almqvist (1793-1866). 1998. 80p. € 5,70.
 Ĉiuj: Skövde: Al-fab-et-o. 21cm. Tradukis el la sveda Sten Johansson.

Estas kiel estas — tiu esprimo aperis ĉirkaŭ dek fojojn en *La Vojo de serpento sur roko*. Kaj ĝi naĝas en mia cerbo centfoje, milfoje. En tri tagoj mi tralegis la supre nomitajn librojn senpaŭze. Dume mi ne povis ne murmuradi: ĉion determinas Dio ĉe kredantoj; ĉio dependas de Sorto ĉe ateistoj.

Ĉe Lindgren, virino — rezignacie aŭ ŝlemile — ne ribelas kontraŭ la okazaĵoj, kiuj elvokas kompaton kaj simpatian al ŝi. Bienulo similaĝa al ŝia patro “intertraktas” kun ŝi, ŝi ne kontraŭbatalas; “bonkora” ŝtelisto “helpas” ŝin, ŝi akceptas; la filo de la bienulo “negocas” kun ŝi, ŝi ne protestas. Ricevante virojn, ŝi ricevas infanojn — kaj plian malfacilaĵon por vivteni la grandigantan familion. Ŝuldo puŝis ŝin en abismon, sed kial ŝi ĉiufoje mem saltis en la abismon? Ĉu ŝia manko de kontraŭago estas intenco de Dio!? Kia prediko: “estas kiel estas”! Pravegas Karl Marks: religio estas narkota! Ho ve, kion Lindgren volus esprimi?

Doktoro Glas, sub vesto de devo kaj helpo, intencas savi virinon mizeran pro geedzeco neharmonia, kaj do li mortvenenas pastron, sian oftan klienton kaj edzon de la virino. Sed rezulte, la virino ne sukcesas edziniĝi al sia kaŝa kunulo, kaj la doktoro mem ne povas akiri la



“savitinon”. Ankaŭ pro Sorto aŭ Dio? “Inversa krimromano”? Ne tiom allogas la intrigo. Tamen, la priskribmaniero estas saliviga. Sur taglibra strukturo la romano saturiĝas de simboleco, medio miksiĝas kun psikologio. De loko al loko la aŭtoro tuŝas multajn flankojn de la homa vivo — amon kaj malamon, feliĉon kaj malfeliĉon... Legante la 88-paĝan

romaneton, oni sentas legi poeziajn florojn de la malbono.

En *Tio konvenas!* filino de vitrista vidvino enamiĝas dum vojaĝo al juna serĝento, sed fine rifuzas geedziĝon, ŝajne pro mizera ekzemplo de siaj gepatroj. Por ŝi konvenas anima kuniĝo sed korpa disiĝo. Tamen por li, kia sorto! Jes, “simpla, ĉarma rakonto pri enamiĝo, preciza kaj amuza medi-kaj vojaĝraporto”, sed ne senskrupula priskribo laŭ nuntempa vidpunkto — kompreneble, en la jaro 1839 tiu ĉi rakonto estis tamen pamfleta.

En Esperanto okulfrapas jenaj specoj de lingva sinteno: kreemo laŭ propra plaĉo, neologismamo laŭ neceso, esploro surbaze de la fundamento... krome eraremo kontraŭ la gramatiko. Evidente Johansson apartenas al la explorema skolo. Ĉe *Tio konvenas!* li uzis puran ortodoksan lingvaĵon, ĉe *La vojo...* buŝ-rakontecan, kaj en la aparte elstara *Doktoro Glas* tre spritajn frazojn, longajn kaj kurtajn, kiuj muarigas laŭ la originalaj cirkonstancoj pensa, aga kaj natura. Oni diras ke ritmo estas spirito de poezio. Tie ĉi sub la transforma plumo de Johansson ritmo montriĝas animo.

Mi miras kiel li posedas tiom da energio. Tradukoj ĉe Johansson kreskas kiel printempa bambu-ŝoso, sed neniam misaj.


Senvoĉe deklamante la tri librojn, entute ĉirkaŭ 260 paĝojn, mi trovis nur probablan mankon de citiloj ĉe p. 7, l. 13 en *Tio konvenas!*

Mao Zifu - Ĉinio

Pedante sed flue

La vidvino kaj la profesoro. Romano. Ronald Cecil Gates (1923). Vieno: IEM, 1997. 132p. 23cm. €10,50.

La juna profesoro en *La vidvino kaj la profesoro* de Ronald C. Gates havas urĝajn tagojn. Li devas ne nur solvi misteron eble kriman, proponi enkondukon de aldonvalora imposto en Aŭstralio, krozi inter du amemaj virinoj kvazaŭ inter Skilo kaj Ĥaribdo, sed krome tra la tuta romano provadi verki favoran recenzon pri malbona libro!



La grava kaj granda merito de ĉi krim-kaj amromano estas ĝia simpla sed lerte elpensita intrigo, kiu de trankvila, idilia komenco malrapide akceliĝas al vere ekscita fino. Dume la profesoro okupas nin per flankaj temoj kiel evitado de virinoj kaj prelegado pri ekonomiko.

La rakonta tekniko kaj lingvaĵo de Gates estas simpla, neeleganta, foje karikaturena. Tamen la rakonto fluas glate, kaj li sufiĉe prudentas por ne transsalti la obstinajn barojn kiujn starigas lia tekniko. Li

adaptas la verkadon al sia kapablo, kaj tia modesteco tro raras en la Esperanta literaturo. Sian profesoron li prezentas kiel sufiĉe sekan formalulon, kaj ne tre gravas ĉu tiu karaktero estas intenco aŭ ne.

Eblas eĉ trovi la rakonton amuza, se la leganto mem alportas bonan humuron. Ekzemple, fojfoje komikas la manio de Gates ĉion trakti kun sama emfazo kaj raportoj kun kontista pedanteco la plej sensignifajn detalojn.

Oni prefere ne tro proksime ekzameni ideojn esprimatajn en la romano. Ekonomika liberalismo estas reala, politiko nereala. Maldekstruloj estas krudaj stultuloj. Vera virino estu malforta; iniciatema virino estas vampiro. Nu, ni lasu tion, prefere legu kaj distriĝu de ĉi flua rakonto.

Sten Johansson - Svedio

Laste aperis



Altigu vian lingvan nivelon: Literaturo en Esperanto. Nicolino Rossi, Federico Gobbo, Romolo Trivella, Renato Corsetti. Red. N. Rossi, R. Corsetti. Milano: CoEdEs, 1999. 64 (ne num.) p. 30cm. Kvin studoj, i.a. pri la nunaj Esperantaj poezio kaj junulara jargono. € 7,20.

Bibliografio di Ido. Tazio Carlevaro (1945)/ Reinhard Haupenthal (1945). Bellinzona / Saarbrücken: Hans Dubois/ Ittis, 1999. 193p. ISBN 3 932807 04 9 kaj 88 87282 01 3. 30cm. Listoj — laŭ aperjaro kaj aŭtoro aŭ titolo — laŭeble kompletaj de libroj en aŭ pri Ido, kaj de periodaĵoj. € 19,80.

Decidoj 101-125. Nova Biologia Nomenklatur. Red. W.M. A. De Smet. 4-lingva (Esperanto, angla, franca, nederlanda). Kalmthout: Asocio por la Enkonduko de NBN, 1996. 79p. 30cm. € 6,30.

Decidoj 126-150. Kiel supre. 89p. € 6,30.

Dilemma dell' Esperanto, II.

Tra vocazione ausiliaria e naturalizzazione. Federico Gobbo (1974). Torino: Università degli Studi, 1998. 253p. 30cm. Itallingva. Ringe bind. Doktora tezo: Kiel Esperanto evoluis el proponata helplingvo al funkcia natura lingvo? € 24,00.

Esperanto ip mun. *Baza lernolibro de Esperanto.* Lee Jung-Kee (1953). Seoul: Samji Books, 1998. 298p. ISBN 89 7358 240 2. 23cm. Por kore-lingvanoj. Komplet: libro kun du kasedoj (voĉlegas Klarita Velikova). € 28,80.

Fundamentoj de la kristanismo, La. Piero Ottaviano. El la itala trad. Armando Zecchin. Torino: Didaskaleion, 1999. 291p. 21cm. Metoda analizo de la instruoj kristanaj (katolikaj). € 4,50.


Higieno de l' murdisto. *Romano* (1992). Amélie Nothomb (1967). El la franca trad. Armela Le Quint kaj Jak Le Puil. Bielsko-Biala: KLEKS, [1999]. 151p. ISBN 83 7194 169 2. 20cm. Bind. Juna ĵurnalistino malkovras sekretojn intervjuante mizantropan Nobel-premiiton literaturan. € 9,00. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Kanto pri amo kaj morto de la flagisto Kristof Rilke, La (1899). Rainer Maria Rilke (1875-1926). El la germana trad. (1932) Josef Mader. Reviziita de Walter Klag patro kaj filo. Vieno: Klag, 1999. 31p. ISBN 3 901211 13 6. 21cm. Rakonto inspirita de familia tradicio. € 1,50.

Kiel kuiri sen viando. Clara de Hess (1910-94). El la hispana trad. kaj adaptis por tutmonda uzado la aŭtorino. Chapecó: Fonto, 1998. 432p. 21cm. Ilus. 1001 receptoj, ne nur por vegetaranoj, sed por ĉiu ajn sanema dommastr(in)o. € 21,00.



Jen du verkoj rilataj al higieno, sed en manieroj poluse malsamaj



Kompara analizo de la sŭahila kaj Esperanto. Nino Vessella (1947). Milano: CoEdEs, 1998. 26p. 30cm. € 6,00.

Leksikono NBN-nomoj 1001-1500. Red. W.M.A. De Smet. 4-lingva (Esperanto, angla, franca, nederlanda), Kalmthout: Asocio por la Enkonduko de NBN, 1997. 114p. 30cm. € 6,60.

Linguistica, le lingue pianificate e l' Esperanto, La. *Centodieci anni di storia.* A. Martinet, U. Eco, T. De Mauro k.a. Red. Daniele Vitali. Milano: Itala E-Federacio, 1998. 79p. 22cm. Itallingva. Esperanto-rilataj tekstoj aŭ intervjuoj de naŭ lingvistoj. € 6,00.

Naturismo kaj skemismo en Esperanto. Daniele Vitali, Anna Löwenstein, Gaetano Speranza. Red. Fabrizio Pagliaroli. Milano: CoEdEs, 1999. 58p. 30cm. Tri lingvaj studoj. € 9,00.

Parlo Esperanto. *Manuale di conversazione.* Davide Astori. Vallardi, 1996. 202p. ISBN 88 11 94408 2. 17cm. Konversacia gvidlibro por itallingvanoj, eldonita en prestiĝa serio. € 15,60.

Quale lingua prima? Renato Corsetti (1941), Mauro La Torre (1946). Milano: CoEdEs, [1993]. 29p. 30cm. Itallingva. Kun angla kaj Esperanta resumoj. Ringe bind. Pri la lernfaciliga valoro de Esperanto, plede

por tuteŭropa eksperimento propedeŭtika. € 6,00.

Repertorio. *NBN-nomoj 1-1400.* 4-lingva (Esperanto, angla, franca, nederlanda). Kalmthout: Asocio por la Enkonduko de NBN, 1995. 107p. 30cm. € 7,50.

Serpente e la colomba, II.

È attuale, e come, l' hillelismo linguistico di Zamenhof? Andrea Chiti-Batelli. Manduria: Lacaita, 1999. 86p. 24cm. Itallingva. "Kiel redoni aktualecon al la interna ideo?". € 7,50.

Sindikata terminaro. Red. Roland Rotsaert kaj YAMASAKI Seikō. Brugge: IKEF, 1996. 44p. 21cm. Terminaro de Eŭropa Unio: 415 esprimoj en la angla, Esperanto, franca kaj germana. Kun Esperanta indekso. € 2,70.

Sonĝo nefinita, La. *Poeziaĵoj de 1982-1997.* Lidia Żukowska (1932). El la pola trad. Lidia Ligęza kaj Andrzej Kołpanowicz. Kraków: Oficyna Krakowska, 1998. 95p. ISBN 83 901546 9 2. 20cm. Poemoj verkitaj ĉar "oni ne povas fotografiĝi sonĝon". € 4,20.

Speguliĝoj. Vimala Devi. Thaumiers: La KancerKliniko, 1998. 24p. ISBN 84 921247 1 7. 24cm. La dua volumo de plurkultura poetino: mallongaj poemoj, kiuj dialogas kun diversaj aŭtoraj frazoj ekzerte cititaj. € 4,65.

Zamenhof oggi. *È possibile, e come, aggiornare e far rivivere la sua idea di una lingua franca universale?* Andrea Chiti-Batelli. Manduria: Lacaita, 1999. 27p. 21cm. Itallingva. Konciza varianto de la eseo *Il Serpente e la colomba* (vd. supre). € 1,80.

REVUO

Juna amiko. *Antologia numero,* marto 1999, n-ro 1 (88). Budapeŝto: ILEI. 52p. 21cm. Vd. apr., p. 75. € 3,60.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA,

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskaj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 2,25 eŭroj. Antaŭdankon pro via mendo!



ARKEOLOGIO: Laborbrigado

Pier Luigi Cinquantini invitas 35 partoprenontojn al la 5-a Internacia Arkeologia Laborbrigado (23-31 aŭg.) en lia vilaĝo, Blera, fama pro etruskaj restaĵoj. Adreso: via Dante Alighieri 2, IT-01010 Blera-VT; ☎/✉+39/761/479-503; ✉pcinqua@tin.it, <http://space.tin.it/io/pcinqua/ial.htm>.

INTERLINGVISTIKO: Pontlingve

Anglalingva disertaĵo pri "La du-nivela morfologio de Esperanto"

estis defendita de Jiří Hana (✉jiri.hana@mff.cuni.cz) ĉe la Karola Universitato de Prago, rilata al la uzebleco de Esperanto kiel maŝintraduka pontlingvo inter la ĉeĥa kaj la angla. (*Esperantic Studies*)

JUNULARO: Svedio-Ukrainio

Lovisa Gustafsson (Svedio) kaj Julija Hordijenko (Ukrainio) partoprenas de januaro ĝis julio projekton kiu celas eduki gvidantojn por la demokratiaj junularaj movadoj en la du landoj, kunorganizatan de la ukraina kaj la sveda junularaj E-organizaĵoj. (*Helianto*)

KATOLIKISMO: Pilgrimi Romen

Tiuj kiuj volas pilgrimi dum la Jubileo de la jaro 2000 al Romo

en esperantlingva grupo, indiku ĉe sia diocezo, en sia nacilingva aliĝilo, la deziron pilgrimi "kun la grupo de lingvo Esperanto". Je ricevo de la konfirmo, kontrolendas ĉu la peto estis korekte akceptita. (*Espero Katolika*)

LITERATURO: Konkurso Liro-99

Urala Esperantista Societo kaj La Ondo de Esperanto invitas al la konkurso Liro-99: Sendu en tri ekzempleroj, ĝis la 1-a de oktobro, konkursaĵojn en kvanto kaj amplekso nelimigitaj, ne jam publikigitajn (papere aŭ rete) aŭ premiitajn, por jenaj branĉoj: originalaj prozo kaj poezio, traduko el la novelo *Hameleon* de Anton Ĉehov, traduko de rusa poeziaĵo libere elektelebla, kaj primovada karikaturo (nur 1 ekzemplero, nigro sur blanko). Subskribu per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun viaj aŭtentaj nomo kaj adreso. Post anonco de la rezultoj je Zamenhof-tago, la plej bonaj verkoj — rekompenditaj per libropremioj — povos aperi zorge de la organizantoj. Adreso: RU-620077 Jekaterinburg-77, ab. ja. 67, Ruslando.

TRADUKADO: Kroata-japana ponto

La 24-an de marto en prestiĝa Zagreba hotelo estis lanĉita japana traduko de Mori Singo el la libro *Tena — Hejmo en Mezeŭropo* de Spomenka Štimec, aperinta en 1000 ekz., kun enkonduko de Ulrich Lins, ĉe Tokia eldonejo, Nippon Tosyo Kankōkai. Pri Esperanto kiel pontlingvo parolis la prezidanto de Kroata Esperanto-Ligo, Dalibor Brozović; fragmentojn

el la libro voĉlegis Vida Jerman kaj Yoko Kogo. Ĉi-okaze la kroata televido elsendis, la saman tagon, kelkminutan programon pri Esperanto. En Japanio, Mori estis televide intervjuita pri la verko, kaj la ĵurnalo *Nisinsyon Sinbun* (700 mil ekz.) prezentis la libron en ĉefartikola kolumno.

Eldonisto Damir Mikuličić (kiu prizorgas la Asteriks-volumojn en Esperanto), esprimis pretecon eldoni

Tena en la kroata. Ekzistas ankaŭ angla traduko de J. C. Bramani.

La novelo *Aŭstralio* de Štimec aperis islandigita de Hallgrímur Sæmundsson en la E-revuo *La Tradukisto*. (S. Štimec, Ret-Info)

SCIENCO: Frustrado kaj malordo

"Frustrado kaj malordo en diskretaj retmodeloj", anglalingva doktora tezo de dana UEA-membro, fizikisto Jesper-Lykke Jacobsen, aperis kun Esperantaj resumoj post ĉiu ĉapitro. La tezo estas konsultebla ankaŭ ĉe <http://www.lps.ens.fr/~lykke/thesis.ps/>.

ZEO: Strato Špicer

Laŭ propono de Kroata E-Ligo, strato konstruata en la urbo Našice ricevis la nomon de Mavro Špicer (1862-1936), milita kuracisto tie naskiĝinta, multflanka pioniro de la Esperantomovado en Kroatio. La urbo decidis omaĝi al Špicer rigarde al la samregiona 3-a Kongreso de Kroataj E-istoj (29-30 majo, Osijek) kaj al la Zagreba UK en 2001. (KEL, N. Rašić)





EGIPTIO: Ĉe Rotario

Guy Penet prelege vekis interenson por E-o ĉe la franca kaj angla Rotari-klubo en Aleksandrio, la 3-an resp. 24-an de marto.

FRANCIO: Ĉu gantoj verdaj?

Baldaŭ 5000 Esperanto-gantoj "laboros" sur francaj konstruejoj: ĉe la firmao CL-Bâtiment — kiun kunestras Michel Basso, prezidanto de Tutmonda Asocio de Konstruistoj E-istaj — ĉiuj konstruejaj laboristoj surhavas gantojn kun la bone videbla surskribo "Esperanto". La gantoj estas jam vendataj ankaŭ al aliaj entreprenoj Alzacaj. (E. Ludwig)

FRANCIO-ITALIO: Enket-helpo

Franca studentino pri geografio, Isabelle Dumont, doktoriĝos per kompara enketo pri senhejmuloj en Francio, Italio kaj Britio. Por la itala parto de sia laboro, ŝi utiligis kontakton trovitan pere de sociala helpisto Yves Nicolas, delegito en Caen, kun Vittorio Madella, delegito en Parma. Dumont ricevis helpon en la Parma regiono dum kvin semajnoj de lokaj e-istoj, kiuj (i.a. R. Sommi, G. Guareschi, G. P. Riccò) sciis atingi por ŝi taŭgajn fakulojn en

JAPANIO: Uneskaj celoj

Internacia Konsilio de Organizaĵoj de Folkloraj Festivaloj, neregistara organizaĵo en oficialaj rilatoj kun Unesko (kiel UEA), okazigis sian Unuan Azian Infan-festivalon (24-30 okt. '98) en Ŭakajama (Japanio). UEA-delegito kaj Unesko-aktivulo EGAWA Harukuni, kiu loĝas en Ŭakajama, proponis kaj kunrealigis du ekspoziciojn kadre de la festi-



IRLANDO: Edukfoiro

Unuan fojon Esperanto-Asocio de Irlando partoprenis edukfoiron por instruistoj en Dublino (25-27 marto), kiun vizitis kelkmil homoj. Ĉe la modesta Esperanto-stando estis disdonitaj informiloj kaj venditaj la unuaj ekzempleroj de la libro "Ĉies propra lingvo", lanĉita en urbocentra hotelo la



26-an de marto, en kiu Maire Mullarney rakontas pri sia iom malfrua, sed ĝojiga renkonto kun Esperanto kaj la spertoj dank' al ĝi. La verko estas aĉetebla en librejoj tra la lando.

Unuafaje la irlanda edukministerio permesis instrui Esperanton en la kvina jaro de mezlernejoj, "transira jaro", kiam la lernantoj povas studi pli libere, ekster la oficiala instruplano. (E-Asocio de Irlando)

Parmo, Fidenza kaj aliloke. "Oni ofte kritikas ke la laboro de e-istoj ne havas ligojn kun la reala mondo" — diras Madella. "Ni deziras atesti ke tiu kritiko maljustas." (Normanda Bulteno, V. Madella)

FRANCIO-SVEDIO-TANZANIO

Laŭ propono de Ambrose Polle, Pacamanta Esperanto-Rondo (PER, en Mwanza, Tanzanio; vd.

valo: pri lernolibroj de elementaj lernejoj, venigitaj kun e-ista helpo, kaj de pentraĵoj fare de aziaj kaj oceaniaj infanoj. La angle-Esperante dulingva albumo pri ĉi lasta (vd. bildon) trafe dokumentas la uzon de Esperanto por Unesko-celoj. (EGAWA H.)

apr., p. 62), E-klubo de Lund (p/a Anna-Maria Lange, Bredgatan 27, SE-222 21 Lund, Svedio) eldonis, kunlabore kun la E-grupo de Montendre (Francio), kalendaron kun koloraj bildoj kaj klarigaj tekstoj, presitan de Alfabet-o. La bildoj montras vidindaĵojn el la tri urboj Montendre, Lund kaj Mwanza. La kalendaro estas vendata profite al la agado de Pacamanta E-Rondo kaj precipe por investi en sunenergian projekton por kuirado.

HUNGARIO: Fervojista kresko

Hungara Fervojista Esperanto-Asocio konstatas en sia jar-kunsido (30 januaro) 19%-an kreskon de la membraro en 1998, dankeblan ĉefe al la grupoj en Szombathely kaj Tata. Hungario gastigos la 52-an Kongreson de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (13-19 majo 2000, Budapeŝto). (Debrecena Bulteno, Hungara Fervojista Mondo)



SZABADI: Tradukoj dudirekten

Vivo feliĉa de Divaldo Pereira Franco, verko kiun en 1994 Spirita Eldona Societo (Rio-de-Janeiro) publikigis en Esperanta traduko de Osvaldo Pires de Holanda (nuna prezidanto de Brazila E-Ligo), estis tradukita hungaren (*Boldog élet*) kaj eldonita de Tibor Szabadi. Laŭ invers-direkta perado, *Faktoj pri Gulag* de János Rózsás (elhungarigis Szabadi kaj broŝure eldonis Debrecena Bulteno, 1997) aperis japanlingve en numeroj de la revuo *Rômazi Sekai*: tradukis KURIYAMA Hitosi.

Szabadi krome eldonis i.a. proprajn tradukojn hungarajn el verkoj de Leopold Vermeiren (kvar titoloj), Poul Thorsen, Martinus kaj Jerald T. Veit. (Debrecena Bulteno, T. Szabadi)

STATISTIKO: Fonto pleje franca

Redaktoro Aleksander Korjenkov en *La Ondo de Esperanto* ĉiujare statistikas la E-libroproduktadon, surbaze de nia "Laste aperis". Laŭ lia konstato, pasintjare ekvendiĝis malpli da titoloj ol en 1997 (208 resp. 273), sed la paĝokvanto estis pli alta en 1998 (sume 28 769, averaĝe po 138 paĝoj). Plej aktivis kiel eldonisto la franca asocio UFE kaj UEA (po 10 titoloj). Estis surmerkigitaj i.a. 78 beletraĵoj, el kiuj 54 tradukitaj. La plej ofta fontolingvo estis la franca, same en 1998 kiel en la sepjara periodo 1992-98 (11 resp. 59 titoloj). Jen kontrasto kun la tutmonda traduk-industrio, en kiu produktiĝas — laŭ *Index Translationum* de Unesko — preskaŭ 50% da tradukoj el la angla (kaj nur 6% en ĝin), dum la elangliga procentaĵo en Esperantujo estas nur ĉ. 16%, ne malproportia kun la supozebla nombro de e-istoj en anglalingvaj landoj.



JUGOSLAVIO: Tutmonden

En diskuto pri la diskonigo de la serba literaturo, la Beograda ĵurnalo *Politika* publikigis (21 feb.) opinion de Zlatoje Martinov (tradukinto i.a. de *Al la mondo donace*, antologio de la serba porinfana poezio), kiu emfazas ke pere de E-o serbaj verkoj povas atingi la tutan mondon. (InfoSEL)

RUMANIO: 400 preĝejoj

La rokpreĝejo de Helsinko kaj ligna preĝejo el Borgsund (Norvegio) plej plaĉis al la vizitintoj de ekspozicio (13 dec.-15 jan., Cluj): pli ol 400 bildkartoj montris preĝejojn en 49 landoj. Ili estis kolektitaj de 'SIGMOND Júlia plejparte dank' al Esperanto, specife pro anonceto kiun Ada Fighiera-Sikorska aperigis en *Heroldo*. (Bazaro)

HONKONGO: Varbokampanjo

Ĉi-jare Esperanto ricevas grandan atenton de la Honkongaj amasinformiloj. En februaro duonpaĝaj artikoloj aperis en la gazetoj *Da Kung Pao* kaj *Ming Pao*. La unua, legata tra Ĉinio, historie ekzamenas la disvolviĝon kaj kulturan kontribuon de E-o en Ĉinio; la dua, unu el la plej gravaj lokaj ĵurnaloj, raportas pri la laboro de Honkonga Junulara E-Asocio (HKJEA), kiu preparas la 56-an IJK (5-12 aŭg. 2000).



Bill Mak intervjuata de fama loka raportistino, Au Lai San.

Membroj de HKJEA, Bill Mak, Jeffrey Li, Grace Lau, Mandy Chan, Karen Woo kaj Kelly Lau, realigis — helpe de UEA/TEJO kaj Güangdonga E-Asocio — unusemajnan ekspozicion, ĉefe por gejunuloj. Eĉ el foraj lokoj venis informigemuloj. La du ĉefaj radiostacioj Honkongaj faris propran raporton pri E-o en marto kaj aprilo. Ili informe atingis almenaŭ 140 mil homojn, 2% de la honkonganaroj. (B. Mak)



CHERPILLOD ree ĉampiono

Gajninto de fama ortografia ĉampionado en Francio (vd. feb., p. 38), André Cherpillod (69-jara) triumfis ankaŭ en la Sesa Diktaĵo de l'Amerikoj, la 9-an de apr., en la urbo Québec (Kebekio, Kanado). La tutmonda francilingva televido TV5 plurfoje elsendis la eventon. (A. Cherpillod)

DARNAULT 100-jara

La franca profesia aktoro Marc Darnault festis sian 100-an datrevenon la 26-an de aprilo. Ni gratulas la fondinton de E-ista Artistaro de Parizo, al kiu oni povas danki i.a. la Esperantajn teatraĵn elsendojn de la Pariza Radio ĉiusemajne dum 16 monatoj en 1938-39. Darnault ankaŭ rolis en la unua plene Esperanta fikcia filmo *Angoroj* (1964).

Oficiala informilo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Francio: André Capus. Britio: David J. Hulatt.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

SUBTENANTOJ (min. \$25): Usono: Margaret Zarchy.

AMIKOJ (min. \$10): Usono: Takaki J. Hashimoto.

PATRONOJ DE TEJO 1999

Francio: Denise M. H. Loisel. Germanio: Stephen Cobb; Rokuro Makabe. Hispanio: Francisco Belmonte Sánchez. Israelo: Jehoŝua Tilleman. Nederlando: Danny ten Haaf. Usono: Rev. Deacon Nicholas Wyborski.

SOCIETO ZAMENHOF 1999

Belgio: Michael Cwik; Jean P. Bovy; Marcel Delforge. Finnlando: Irmeli Tanskanen; Raita Pyhälä; Unto Seppälä. Francio: Jeanne Roy; Maurice Sujet; Pierre Métyvier; Jean-Louis Texier. Germanio: Alexander Putze; Rokuro Makabe. Hispanio: Josep Castellort i Riba. Israelo: Josifa Rabino. Italio: Clara Gubbioli Carioli. Japanio:

KUROYANAGI Yosita. Korea Resp.: LEE Chong-Yeong; KIM Yung-myung. Nederlando: Danny ten Haaf; W.C. Keizer. Slovakio: Helena Seres. Slovenio: Jožica Židanik. Svedio: Inga-Maj Lindkvist; K.G. Lennart Lagerkrantz. Usono: Bruce Arne Sherwood; Alberta Seabold Casey; David Wolff; Margaret Zarchy.

DONACOJ 1999 (EUR)

ĝis la 31-a de marto

Asocia Kapitalo: Britio: heredaĵo C. A. Field 81 350,37. Sumo ĉi-jara: 81 350,37.

Fondaĵo Ameriko: Brazilo: J. R. Piton 24,25. Sumo ĉi-jara: 24,25.

Fondaĵo Azio: Japanio: S. Aikawa 45,32; M. Asami 15,10; D.R. Curtis 6,87; H. Gotou 15,10; H. Inumaru 15,11; H. Isobe 15,10; I. Katou 15,11; T. Kawai 15,10; K. Kazawa 15,50; M. Kinoshita 15,11; K. Kobayasi 15,11; Y. Maeda 15,10; H. Matuda 45,32; S. Minaba 15,11; Y. Mine 15,11; N. Nisimura 15,11; A. Ooisi 15,11; S. Oonisi 15,10; A. Saiki 77,49; K. Sasanuma 15,50; H. Tai 15,11; H. Takubo 37,76; Y. Tanaka 45,32; S. Turuta 30,21. Korea Resp.: Kim Yang Sun 5,03. Turkio: S. Katircioğlu 5,04. Sumo ĉi-jara: 909,42. Fondaĵo Canuto: Institucio Hodler 2000,00.

Francio: M. Abada-Simon 15,25; R. Lebrun 9,91. Germanio: P. Roether 30,49. Litovio: T. Steele 13,61. Nederlando: G.A.M. van Bergeijk 45,00; F.D. van Zoest 11,34. Slovenio: J. Židanik 403,20. Sumo ĉi-jara: 2999,70.

Konto Espero: Aŭstralio: M. Furness 674,83. Kanado: Kanada E-Asocio 108,30. Nederlando: C. Bossong-Singer 30,40. Sumo ĉi-jara: 813,53.

Triamonda Kong. Fondaĵo: Britio: A. Montesinos de Gomis 6,80. Germanio: J. Gersonde 10,16; S. Krüger 17,79. Pollando: K. Babiarz 54,45. Usono: R. Grossman 22,68; D. Holland 9,07. Sumo ĉi-jara: 256,79.

Volontula Fondaĵo: Institucio Hodler 1500,00. Germanio: J. Gersonde 10,16; P. Roether 30,49. Sumo ĉi-jara: 1670,71.

Kampanjo 2000: Kanado: B.R. Crisp 11,34. Usono: D. Vallon Wheeler 11,35. Sumo ĉi-jara: 204,20.

Ĝenerala Kaso: Francio: J. Rapley 50,00. Italio: B. Vidale 8,26. Nederlando: F.D. van Zoest 11,34. Portugalio: W. Oeste 2,49. Usono: R.P. Lynch 45,33; D.M. Rose 5,44; C. Schulze 2905,59. Sumo ĉi-jara: 3420,90.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

KARVINEN: Alta konsilisto

Arvo Karvinen (65-jara), finna blindula aktivulo, UEA-komitatano, ricevis de la finna prezidento la altan titolon "organiza konsilisto" pro sia plurjar-deka sociala agado por handikapuloj, en- kaj eksterlande, ĉefe en la tria mondo. (*Esperanto-lehti*)



Arvo Karvinen (maldekstre) kaj Raimo Tanskanen sub Cart-memortabulo

JAKUBINYI: Unu voĉo el 250

Esperanton kiel komunan lingvon por la katolika eklezio proponis en 1991, en Roma sinodo de episkopoj, mons. György Jakubinyi (56-jara), tiama vic-episkopo kaj nuna ĉefepiskopo de Alba Iulia en Rumanio (vd. marto '92, p. 57). Ĉe <http://home-t-online.de/home/Ulrich.Matthias/ikue.htm/> eblas legi (germanlingve) detalojn: "En 1967, en la episkopa sinodo, ĉiuj 250 episkopoj el la tuta mondo faris sian 8-minutan alparolon en la latina, sed en 1991 (...), el la 250 maksimume dek-kvino parolis ankoraŭ latine. (...) Mi diris ankaŭ ke ŝajnas al mi ke oni tiom kontraŭas Esperanton ĉar ĝin elpensis pola judo, do pro antisemitismo. Sed, amuze, ĉi tiu frazo estis forstrekita el multaj publikigaĵoj." Li konkludas: "poste Esperanto ne plu estis menciita, temis nur pri epizodo, pri unu voĉo inter 250 voĉoj."

KISELMAN en la AIS-senato

Post la forpaso de prof. Tyburcjusz Tyblewski (vd. feb., p. 40), lian lokon en la senato de Akademio Internacia de la Sciencoj transprenis la ĝisnuna vic-senatano prof. Christer Kiselman (59-jara). (R. Fössmeier)

MARTINS-TUVALKINA: Nupto

La 26-an de marto, en la manĝejo de teknika lernejo en Ĉeboksari (Ĉuvaŝio, Ruslando), ĉ. 30 e-istoj kaj 25 parencoj festenis la geedziĝon de Irina Tuvalkina (22-jara) kaj Antônio Martins (29-jara, Portugalio). (*Artefakto*)

SUCHÁNEK: Revidiĝo

Eksa ĉeĥa ambasadoro en Aŭstralio, Jaroslav Suchánek, kiu alparolis la Adelajdan UK-on (vd. '97, p. 142), prelegis lastatempe ĉe la E-klubo de Ostrava-Vítkovice. Suchánek estis revokita de la posteno en februaro 1998 pro delikta hipotekado de la ambasada konstruaĵo. (*Starto, České Noviny*)

AULD: "Vera trarompo"

"Mi ĝojas pri la kandidatigo por la Nobel-premio, ĉar tio rezultigis en reala kaj senĉikana raportado pri nia literaturo en la vasta eŭropa informilaro. Konsternis min la rapidega disvastiĝo de la raporto disde nia tute negrava loka semajna ĵurnalo tra la gravaj naciaj tagĵurnaloj ĝis grandaj eksterlandaj gazetoj! Kaj la multoblaj mencioj kaj intervjuoj en ĉefaj BBC-programoj! Kaj ĉiam kun plena akcepto de la seriozeco de nia afero. Vere, ia trarompo, dank' al Manuel de Seabra, la internacia PEN-klubo k.a." (William Auld, en intervjuo al *La Ondo de Esperanto*)

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton ĉe ripeto de anonceto. La tarifon de anoncoj vd. en la kolofono, sub la enhavtabelo.



ANONCETOJ

NORVEGA E-LIGO ofertas diversajn malnovajn Esperanto-periodaĵojn kontraŭ kovro de la afranko ĝis la fino de junio. Adreso: Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo, Norvegio. Rete: esperanto@online.no.

RINGOKRUCIĜO ESPERANTO estos inaŭgurita la 10-an de julio en la vaste konata potfarista vilaĝo Betschdorf. Gratuloj al la urbestro, s-ro Adam, estas bonvenaj ĉe: M. le Maire, Mairie, FR-67660 Betschdorf, Francio. Vi ankaŭ povas klaki je http://www.betschdorf.com/kaj_lasi_mesaĝon_ĉe_CONTACT.

44-JARA POLA ESPERANTISTINO volus korespondi tutmonde: Anna Laskowska, ul. Matysiaka 6, PL-22-300 Krasnystaw, Pollando.

BRAZILANO, EKSEDZIĜINTA, 67-jara, vegetarano, deziras korespondi kun esperantistino cele amikiĝi, eble enamiĝi kaj eĉ kunloĝi. Bv. skribi al: Wallace Amery, Rua Gustavo Maciel 29-60 Apto 103, BR-17041-200 Baurú — SP, Brazilo (Brazilo).

MONDA FEDERACIO DE KURACISTOJ por la respekto de la homa vivo eldonis broŝuron (15 p.) en Esperanto, *Eŭtanazio hodiaŭ*. Interesatoj kontaktu la federacian sekretarion: d-ro Philippe Schepens, Serruyslaan 76, BE-8400 Oostende, Belgio; ☎+32/59/800-860; 📠707-446; 📧philippe.schepens@ping.be.

FRANCAJN-ESPERANTAJN FAKVORTAROJN pretigas Christian Bertin. La astronomia fakvortaro estas havebla per la reto por kontrolo el <http://www.esp.webprovider.com/>, en la rubriko "vortaro/terminaro". Se vi pretas kontroli aliajn fakvortarojn, enigu vian nomon per la sama servilo. ☐christian.bertin@lemel.fr.

SE KUN PAKISTANA ESPERANTISTO vi volas korespondi, skribu al *Facila Esperanto*, organo de Pakistana E-Asocio: Tariq Mehmood Khokhar, #405, Ginza Center, Blue Area, Islamabad, Pakistano; ☐pak_esperanto@hotmail.com.

FABRIKITAJ EL NATURAJ SUBSTANCOJ, la produktoj de Golden Neo-Life Diamite sanigas de multaj malsanoj. Se vi havas nesolvitan sanproblemon aŭ volas esti distribuanto de GNLD-produktoj, kontaktu: GNLD Esperanto-Teamo, B.P. 13169, Lomé, Togolando; ☎+228/272-117.

MONDA TURISMO. En kalendaro-'99 bonvole korektu: ISRAELO: Jeremi Gishron, ☎972.2.586 62 49, kaj aldonu: MAIER TURISMO, PK. 13046, IL-44 862 Cur Jigal, ☎/📠972.9.749 69 21; ☐maier@adamnet.co.il. Por turistoblecoj dum la jaroj 1999/2000 kaj por Jerusalema Seminario antaŭ la UK — kontaktu jam nun!

Joan Dawson (1920-1999), delegitino en Harrow (Britio), mortis la 27-an de marto.

Georgi Dimov

(1906-1999), esperantisto de 15-jara aĝo, forpasis la 7-an de marto en Varno (Bulgario). Ekkoninte en 1934 la Cseh-metodon, de 1940 li instruis

la lingvon multloke: en tuta Bulgario, en Islando, Finnlando, Pollando, Afriko — kaj laste, antaŭ 10 jaroj, al veteranoj-esperantistoj en Varna. Dimov kuntradukis la klasikan bulgaran romanegon *Sub la juĝo* (1959), kunkompilis grandan E-bulgaran vortaron (1963), verkis ĉiugradajn lernolibrojn, vortarojn, gramatikojn kaj metodikajn artikolojn. Li estis delegito pri Cseh-metodo kaj turismo.

Velimir Lukež (1912-1999), oficiala Esperanta turisma gvidanto de la urbo Zagrebo, forpasis la 21-an de februaro. Li aŭtoris la gvidlibron *Zagreb. Historia prezento* (1987) kaj gvidis multajn kursojn en fervojistaj rondoj.

Jovan Nešić (1924-1999), iama delegito en Niš, motoro de la E-agado en pluraj urboj de Jugoslavio, iniciatinto de E-ripozejo en Bela Palanka, mortis la 27-an de januaro.

ĜUSTIGO

Poemojn de Henri Vatré (feb., p. 40) ne enhavis la libro *Naŭ poetoj* (1939). Aperis en ĝi, postmorte, kvin poemoj de lia unua edzino, Juliette Baudin-Vatré (1910-1937). Dankon al Irmi Hauptenthal pro la atentigo.

Oene Hoekstra (1923-1999), Honora Membro de UEA ekde 1988, forpasis la 12-an de marto en Schoorl (Nederlandoj).

Hoekstra ekkonis Esperanton jam kiel 12-jarulo. Du jarojn poste li ricevis ateston de Cseh-kurso, dank' al kiu li persvadis sian lernejon starigi E-kurson. Kiel estro de loka klubo, estrarano kaj prezidanto de Nederlanda Grupo de Geinstruistoj pri Esperanto (NGGE), estrarano de Nederlanda E-Asocio, administranto de korespondaj kursoj kaj multfoja kursgvidanto, li elstare kaj praktike kontribuis al la nederlanda E-movado. Liaj kursoj ĉe la Universitato de Nimego provizis E-organizaĵojn per dekoj da aliĝintoj kaj

per postaj aktivuloj. En 1977 li kunordigis Lernejan Semajnon en Belgio por 166 diversnaciaj infanoj. En 1982 li eklaboris kun prof. Van Els kaj d-ro Knibbeler pri nova metodo de efika fremdlingvo-lernado (*La esplor-kreiva vojo*, 1996), kiun li prezentis diverslande. En 1988 li organizis Turisman E-Kongreson en Alkmaar. En siaj lastaj jaroj li estis ekstera kunlaboranto de la Eldona Fakto de UEA: i.a. li kompostis la kompletan *Pajleroj kaj stoploj* de William Auld.

Hoekstra estis longtempe delegito kaj membro de Societo Zamenhof, regula mecenato de TEJO kaj de diversaj fondaĵoj de UEA. Ankaŭ ILEI kaj NGGE omaĝis al Hoekstra per honora membreco.

Luis Eduardo PALACIOS TORAL (1926-1997), eminenta aktivulo en Kartageno (Kolombio) ekde la 60-aj jaroj, mortis antaŭ du jaroj.

Gustavo PERINI (1897-1998), iama sekretario de la E-grupo en Trento (Italio), kiu dum multaj jaroj instruis Esperanton kaj servis ĝis 1985 kiel delegito, forpasis la 20-an de decembro, pli ol centjara.

Marko PETROVIĆ forpasis la 24-an de februaro, 59-jara, en Mirkovci (Kroatio). Li tradukis kaj verkis, kontribuante al pluraj antologioj en Jugoslavio kaj Kroatio. En 1990 aperis lia satira versaro *Ilia tosto je nia kosto*.



Mladen Šerment

(1920-1999), konata kroata aktoro, e-isto de 1936, mortis en Zagrebo la 2-an de marto. Teatre aktiva en Esperanto ekde 1957, li ofte gastis en UK-oj kun

teatraĵoj i.a. de Goldoni, Ibsen, Moliere kaj Sartre. Li gvidis la dramatan sektion de Studenta E-Klubo en Zagrebo de la fondo en 1959, kaj edukis tie, teatre kaj lingve, generaciojn de e-istoj. Inter la homoj kiujn li gajnis por Esperanto estas Vida Jerman. Dum multaj jaroj li servis kiel juĝanto de la teatra branĉo en Belartaj Konkursoj.

Estraro de UEA

Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo): S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎ +61-2-9810-4227; ✉ +61-2-9555-9705; ✉ keponderby@bigpond.com.

Vicprezidanto (Kampanjo 2000, landa agado, financo): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto,

IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39-06-957-57-13; ✉ +39-06-957-66-33; ✉ corsetti@itelcad.it.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; ✉ +39-06-39-72-61-69; ✉ lipari@esperanto.nu.

Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado): d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice,


Ĉeĥio; ☎ +420-2-991-2201; ✉ +420-2-991-2126; ✉ chrdle@telecom.cz.

Estrarano (Afrika agado): s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-27-21-17.

Estrarano (informado): s-ro Kalle Kniivilä, Skyttelinjen 55, SE-226 49 Lund, Svedio; ☎ +46-70-636-93-78; ✉ Kalle.Kniivila@sydsvenskan.se.

Verkoj de Zlatko Tišljar

Neeviteblaj por ĉiuj, kiuj deziras kompreni la rilaton inter la Esperanto-movado kaj la mondo.



1. Eŭropa ideologio. Verko premiita ĉe la Belartaj Konkursoj 1998. Ĝe pozitive recenzita de neesperantistaj slovenaj universitataj profesoroj. Aperis jam la slovena kaj germana tradukoj. La verko malfermas novajn perspektivojn por Esperanto kaj klarigas la rilaton inter identecoj, ideologioj kaj lingvoj. 6,90 eŭroj.

2. Esperanto vivos malgraŭ la esperantistoj. Eseo pri la esperantista popolo kaj sciencaj verkoj analizantaj la facilecon de Esperanto kompare kun aliaj lingvoj. 12,30 eŭroj.

Mendu ĉe **Inter-kulturo:**

Besednjakova 1, SLO-2000 Maribor, Slovenio.

Fax: +386-62-100669.

Triona rabato por minimume 4 ekz. de la sama titolo.

Unika fojo en Hanojo



Dua Azia kongreso de E-o, 22-25 aŭg.

Kongreskotizo: 160 USD por A-landoj; 100 USD por B-landoj. Senpage por infanoj ĝis 13 j. kaj akompanantoj de handikapuloj. **Loĝado:** 5* Hotelo Horison (la kongresejo): 65USD; 4* kaj 3* Hotelo Hanoi 27-47 USD; Hotelo Kim Lien 7 USD (dulita ĉambro). **Tage tri manĝoj:** 20 USD (Horison), 15 USD (Hanoi), 10 USD (Kimlien). **Ekskursoj** duontagaj ĉiutage, en kaj ekster la urbo. **Antaŭ- kaj postkongresoj,** vesperaj kulturaj kaj amuzaj programoj antaŭvidataj. **Limdato por mendoj:** 20 junio.

Fakaj asocioj kiuj planas organizi kunsidon dum la kongreso, kontaktigu kun Puramo CHONG (☐puramo@chollan.net).

Loka organizanto: Vjetnama E-Asocio, 105A Quan Thánh Str., Hà Nội; ☎+84/4/823-20-12; ☎/733-02-01. Informas ankaŭ Komisiono pri Azia E-Movado (☐kaem@egroups.com) kaj Japana E-Instituto (☐jei@mre.biglobe.ne.jp). **Aliĝilo** petebla de la CO de UEA.



LA RADIKOJ DE EVOLUO

Mervyn Claxton

Kulturo kaj evoluo



La kulturo de ĉiu popolo estas intime ligita al ĝia evoluo. Lastatempe tiu ligo rompiĝis, precipe en evolulandoj, pro adopto de la okcidenta evolumodelo kaj internaciigo de la okcidenta evolumodelo. La aŭtoro de tiu ĉi Unesko-studo – klerulo kaj eksdiplomato el Trinidado kaj Tobago – tamen montras kiel ankaŭ nun eblas utiligi la tradiciojn de la popolo por ĝia evoluo.

“Evoluo povas prosperi nur se ĝi havas radikojn en la kulturo kaj tradicio de la koncerna lando.” (p.15)

KULTURO KAJ EVOLUO. Mervyn Claxton. El la angla trad. Johano Rapley. Rotterdam: UEA, 1998. 60p. ISBN 92 9017 059 X. 21cm. Prezo: € 6,80.

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

Tri imponaj volumoj grandrabate!

EDISTUDIO decidis malaltigi la prezojn de multaj siaj libroj. Aparte okulfrapas la novaj prezoj de: Ŝekspiro, **La sonetoj** (trad. W. Auld, dulingva eldono, 326p), 45,00 12,00 eŭroj; W. Auld, **En barko senpilota** (plena poezia verkaro, 874p), 36,75 21,00 eŭroj; **Aŭstralia antologio**, 34,00 21,00 eŭroj.

SIMPLE LA PLEJ BONA!

SESA ELDONO
DE LA
INTERNACIA
LERNOLIBRO



Rotterdam: UEA, 1996. 234p. Prezo: € 10,90.
Sonkasedo: € 5,45. Triona rabato ekde 3 ekz.

Azien Somere / Azien Aŭtune '99

3-a Internacia Studenta Kongreso
de Azi-Pacifikaj Landoj

26-29 oktobro Vladivostoko, Rusio
informo: A. Titajev <espero@irex.vl.ru>

4-a Ĉina Kongreso

17-21 aŭgusto
Pingxiang, Ĉinio
(landlimo al Vjetnamio)
informo: ĈEL

2-a Azia Kongreso

22-25 aŭgusto
Hanojo, Vjetnamio
informo: UEA, JEI

31-a Korea Kongreso

9-10 oktobro
Seulo, Koreio
informo: KEA

86-a Japania Kongreso

15-17 oktobro
Motizuki, Japanio
(150km de Tokio)
informo: JEI

18-a Komuna Seminario

29 julio - 1 aŭgusto
Wanihama, Japanio
(30km de Kioto)
informo: JEI
<junuloj@po.teleway.ne.jp>

JEI : Japania Esperanto-Instituto

(JP-162-0042 Tokyo-to Sinzyuku-ku
Waseda-mati 12-3)

KEA : Korea Esperanto-Asocio

(Kang Byeon Han Shin Core B/D No 1601
Mapo-Dong 350, Mapo-ku, Seoul)

ĈEL : Ĉina Esperanto-Ligo

(P.O. Kesto 825, CN-100037 Beijing)



En 1998 224 esperantistoj subtenis
la agadon de UEA per aliĝo al

Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de
mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la
prezidanto de UEA, inviton al akcepto en
UK kaj donaceton kun la Jarlibro,
kiu en 1998 estis bela SZ-kalkulilo.
La kotizon (duoblo de MA por via
lando) vi povas pagi al via peranto
aŭ rekte al UEA.




**MULTKOLORA GLUMARKO IGAS VIAJN
KOVERTOJN PARTOPRENI EN KAMPANJO 2000!**

Prezo de folio (12 glumarkoj): € 1,35.
Triona rabato ekde 3 folioj.

GVIDILO PRI HOMAJ RAJTOJ

Okaze de la 50-a
datreveno de la
Universala Deklaracio
de Homaj Rajtoj UEA
eldonis tiun ĉi
lernolibron de Unesko
pri homaj rajtoj,
aperintan antaŭe jam
en 16 aliaj lingvoj.
Leah Levin estas brita
fakulo pri homaj rajtoj.
La unua parto de ŝia
libro priskribas la
internacian juron pri
homaj rajtoj, kun multa atento al la evoluo de
la proceduroj por protekti homajn rajtojn kaj
al la hom-rajta edukado. La dua parto klarigas
la enhavon kaj signifon de ĉiu artikolo de la
Universala Deklaracio. La modele tradukita kaj
bele eldonita libro estas ilustrita de Plantu,
fama franca karikaturisto.



HOMAJ RAJTOJ: DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ. Leah Levin. Ilus.
Plantu. El la angla trad. Edmund Grimley Evans. Rotterdam:
UEA, 1998. 140p. ISBN 92 9017 058 1. 21cm. Prezo: € 10,90.